

OOMOTO




1934

Decembro

Oomoto Centra Oficejo

Kameoka Kioto-hu Japanujo

INTERNACCIA



Kvintesenco de OOMOTO

Deveno kaj Celo: La vorto «Oomoto» signifas Fundamenton. La Fundamenta (aŭ Centra) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino *Nao Deguĉi* Sian planon por la reformo de la Mondo. Ni nomas Sinjorinon *Nao Deguĉi* la «Fondintino» de Oomoto. La dia Reformplano konsistas en la ekstarigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la Teron. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

Nuna Stato de Oomoto: Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigis sian agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro Onisabro *Deguĉi*, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj scioj. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la Homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo). Lokaj Centroj estas en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 1,800 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, monata gazeto «OOMOTO INTERNACIA» aperas en Kameoka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuigas kun Orientaj potencaj spiritmo-

vadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala Ruĝsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaj movadoj — Tsaili-Hui, T'uch-Hui, Anching-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Blanka Frataro en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondopaco. Ni vokas al ĉiuj tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

Maksimoj:

1. Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la *Korpon de Dio*.
2. Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la *Forton de Dio*.
3. Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la *Animo de Dio*.

Ĉefinstruo:

Dio estas spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestigas senlimaj forto kaj aŭtoritateco.

Devizoj:

1. Harmonio inter Dio kaj homaro.
2. Instruo pri Dia Vero.
3. Fundamenta moralo.
4. Sankta karaktero de la misio.

Principoj:

1. Pureco de animo kaj korpo.
2. Unuigo inter klasoj de la socio.
3. Optimismo pri la aranĝo de Dio.
4. Progreso por la socia plibonigo.

Kovrilo: Vojaĝanto: desegnaĵo de S-ro Hidemaru *Deguĉi*.

Supra foto: Oomoto-Teritorio de Kameoka, vidata de stacidomo.

OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO KAJ DE UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Jaro 10

Decembro 1934

N-ro 12 (112)

Ĉefredaktoro: Koogecu NIŠIMURA.

Redaktoro: Jozefo MAJOR.

Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto.

Pri kotizoj ktp. legu la lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Ekonomia Savo venos el la Oriento

— Koogecu Nišimura —

Unu tagon, kiam mi ankoraŭ estis en Parizo, s-ro Krestanof vizitis min kaj enskribis en mia frazlibro, preparita por vizitantoj, ke *ni unue homiĝu!* Mi surpriziĝis, ĉar mi opiniis, ke homo estas homo kaj li klopodu fariĝi dio! Alian vesperon, ĉe l' Sorbona kunveno s-ro N. ripetis dufoje dum sia parolado, ke *ni estas bestoj*, sed je tio neniu aŭskultanto ŝajnis ofendiĝi: la tuta ĉeestantaro eĉ ĝoje akceptis lian aserton... sed mi denove surpriziĝis je la de mi neforgesebla esprimo! Por la okcidentanoj tio estas banala pro Darwinismo kiu instruas, ke la homa prapatro estas besto, sed por la japanoj tio estas netolerebla, ĉar laŭ ilia kredo, ili estas idoj de Dio. Jen estas psika diferenco inter la okcidentanoj kaj la japanoj.

Kiam mi vizitis malgrandan urbon en Ĉeĥoslovakujo, mi alvenis antaŭ vastega konstruaĵo en la eksterurbo. Mi demandis al mia akompananta samideano, kio ĝi estas? Li respondis: ĝi estas honto al ni! Mi sentis refreŝiĝon pro lia rimarko, ĉar ĝi estis buĉejo. La unua ĝojo kiun mi ĝuis post mia reveno al Japanujo estis ke en mia lando feliĉe troviĝas nenie tia granda buĉejo, nek tiaj luksaj butikoj kie oni elmontras bestajn kadavrojn, kiajn oni trovas ĉie en Eŭropo. Viandejoj, kompreneble, troviĝas ankaŭ en Japanujo, sed ili provizas nur malgrandajn pecojn, tiel ke oni eĉ ne rimarkas ilin dum promenado. En Eŭropo, tamen, oni vidas dum la kristnaska semajno pompan elmontron de ornamitaj bestkadavroj en grandaj viandegoj. Promenante en tia atmosfero mi ofte pensis, ke malfacile estas deziri, ke

homoj fariĝu dioj! Bedaŭrinde la nuna mondo fariĝis mondo de bestoj — almenaŭ mondo bestanima! Kaj kvankam ĝia purigo postulas fundamentan ŝanĝon en la sintenado de l' okcidentanoj, tamen estas domaĝe, ke ili ankoraŭ retenas sian malnovan politikon internacian. Ekzemple:

Nuntempe okazas en Londono la Mararmea Konferenco, kie Japanujo iniciatis la forigon de aĉakmilitŝipoj sur la fundamento de egaleco en militŝipa fortenco, kaj tio estas justa propono, sed Anglujo kaj Usono ne volas akcepti tion. Kial do, se ili efektive deziras pacon kaj amas justecon? Ilia koncepto pri paco kaj justeco tiuokaze estas kondamninda kaj oni suspektas ke tio estas nur lerta artifiko por subpremado de japanaj movoj. Ankaŭ pri la internacia komerco ili konstruas grandegan barilon de dogantarifo kaj deziregas forigon de l' hodiaŭaj inerteco kaj stagneco en komerca kampo. Kial ili daŭrigas la malsaĝon doni spronon al la ĉevalo sen forigo de la barilo de l' stalo?

Ĉu efektive savo devas veni el la Oriento? Nia Majstro Onisabro Deguĉi fondis grandskalan movadon sub la standardo de l' Homaranismo — kun la celo realigi la idealojn de l' *universalaj politiko kaj ekonomio* (kies detalojn ni baldaŭ publikigos). Unuvorte, lia universala politiko celas la starigon de l' granda sistemo de tutmonda familio, dank' al kies efektivigo, ĝuos feliĉan vivon ne nur la orientanoj, sed ankaŭ la okcidentanoj, tute egale, ĉu burĝoj aŭ proletoj! Sed la Monda Familio bazota sur la universala politiko devas stariĝi sur nova sistemo de l' universala ekonomio,

ĉar ekonomio estas animo de la homaro: de ĝi dependas ĉiu homa feliĉo kaj paco. Kun la supra konvinko nia Majstro nun klopodas plibonigi *radikale* la japanan ekonomian sistemon kaj plej frue montros bonegan modelon al la Okcidento, — por ke, tiamaniere, la tutmondo havu la longedeziritan pacon sur la tero! Tra la tuta Nipponlando li mem propagandvojaĝas ĉe l' fronto de l' movado farante paroladojn pri sia entrepreno. Oni povas imagi lian aktivan agemon el la fakto inter aliaj, ke

la tuta distanco de lia vojaĝo en Novembro atingis 7,000 mejlojn. Kun braveco kaj kuraĝo de l' juneco li ĉiu-tage kaj nokte daŭrigas sian laboron malgraŭ lia aĝo, por varbi dek milionojn da simpatiuloj kaj ĝisnun akiris jam du milionojn da ili krom Oomotanoj de post lasta julio! Sendube li faros baldaŭ grandan nomon en la tuta mondo. Karaj gelegantoj! Kiuj ne kontentiĝas per la nuna besta vivo kaj serĉas pacan hejmon de l' Granda Familio, kolektiĝu sub la standardo de l' Homaranismo!!

Esperanto kaj la Ligo de Nacioj

— H. Boucon —

Oni scias, ke la Ligo de Nacioj estas iaspeca parlamento, kiu sidas en Ĝenevo, ĉefurbo de Svisujo kaj kies membroj estas elektitaj de siaj respektivaj registaroj. Tiu parlamento interkonsiliĝas, diskutas kaj leĝas, por firme starteni la pacon inter la popoloj, t. e. por forigi la militon el la homara socio. Tia tasko estas malfacila kaj ĝia celo nepre laŭdinda. Bedaŭrinde, por sukcesi, la Ligo bezonas ankoraŭ multe da diversaj aferoj. Ĉar ĝi havas nek specialan teritorion, nek policon, nek armeon, ĝia influo, kompreneble, povas esti pure morala. Krom tio, al tiu sindire internacia tribunalo mankas io alia ankaŭ tre grava, nome, ia komuna, neŭtrala lingvo, ia lingvo demokrateca, egale kaj facile uzebla por ĉiuj. Ha! tiuj Ĝenevaj Kunsidoj! Dio ĉiela! Kia konfuzo! Kia Babela turo! Tuta legio da interpretistoj kaj tradukistoj estas necesaj. Oni ne imagas, kiom perdiĝas tie da tempo kaj ankaŭ da *mono*. Ja jes da *mono*, ĉar ĝin oni ne ŝparas en la bela *Kalvina* urbego, tiagrade ke multaj ŝtatoj, laŭdire, ne povas pagi sian kotizon. Plorinda mizero!

Laŭ mi, kio precipe mankas al la Ligoj, tio estas certa mistiko aŭ entuziasmo, kvazaŭ ia internacia patriotismo; ili havas nek insignon, nek standardon, nek himnon internacian, kiam, kontraŭe, ni, Esperantistoj, montras fiere nian standardon, kies verda koloro signas la pacon kaj la esperon; nia insigno, la kvinpinta stelo, sim-

bolas la kvin terpartojn; en kunvenoj kaj festoj ni kantas nian belan himnon: «*En la mondon venis nova sento*»; nia devizo tekstas: «*ni laboru kaj esperu*» kaj fine ni salutas unu la alian metante la manon sur la koron laŭ kavalira maniero. Laŭ la Boulogne'a deklaro, «*Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas*». Sed jam en la jaro 1906, Zamenhof diris en Ĝenevo mem: «*Al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*». Tiu interna ideo, aŭ homaranismo, laŭvere, neniam estis klare difinita; ĝi tre similas al la *Homamo* predikata de S-ro Deguĉi; ĝi estas kvazaŭ kaŝita, religia sento sen dogmoj; ĉar, vole-nevole, la Esperantistoj laboras por la paco, por la frateco inter ĉiuj homoj.

Vane do nin malŝatas ankoraŭ kelkaj diplomatoj ĉe la Ĝeneva Institucio; vane ili pretendas trudi al la mondo sian egoisman politikon, kontraŭ kiu jam kelkaj nacioj ribelas. La Ligo de Nacioj estas kvazaŭ korpo sen animo: aŭ ĝi mortas, aŭ ĝi fariĝos, danke al ni, la Templo de l' Homaranismo. Ni plu laboru kaj paciencu: frue-malfrue, nia verda standardo flirtos sur la *Palaco de la Nacioj*.

Rakontoj el la Spirita Mondo**de Majstro Onisabro Deguĉi****Unua Volumo (2)****7 JUĜO EN LA INTERA REGNO**

Mia vilaĝa protektodio, la sendito kaj mi ricevis permeson de la regnestro ĉeesti la juĝejon de la Intera Regno por observi tie la juĝomanieron. Plej alte de la sidejo por la juĝistoj-dioj sidis la regnestro kaj iomete pli malalte troviĝis en vico granda nombro da oficistoj-dioj kun severaj mienoj. En la plej malsupra juĝoloko sidis respekteme multaj homoj, inter kiuj sin trovis la vojaĝantoj, kiuj antaŭ nelonge postsekvis nin trans la riveron de serpentejoj; ili versaĵne atendas la juĝon.

Mi vidis tie ne sole japanojn kaj koreojn, sed ankaŭ ĉinojn kaj aliajn multajn naciojn. Ĉar mi ekmemoris, ke sur japanaj bildoj pri la Infero, mi neniam vidis fremdulojn, sed nur japanojn, mi demandis al la disendito mallaŭte pri la kialo; sed li balancis ial la kapon kun neo, sen respondo, mi do ankaŭ silentis.

En tiu momento mi direktis la rigardon al la regnestro en la vizaĝon kaj jen! mi estis konsternita de teruro. Mi estus sveninta, se mia protektodio kaj la sendito tiam ne estus apoge min helpintaj ambaŭflanke.

Ĝentila, gracia kaj ridetanta kun nobla staturato, la regnestro prenis subite teruran ruĝan mienon: la okuloj gigantiĝis, la buŝo tiriĝis ĝis la oreloj kaj el tiu buŝo ekvidiĝis fajra lango. La oficistoj-dioj ankaŭ havis tiel sovaĝan kaj teruran mienon, ke ilin longe rigardi oni ne povis. La tuta juĝejo do prezentis eksterordinare timigan aspekton.

La estro faris signon al unu el la oficistoj veni antaŭ lin, kaj donis al li kajeron, kiun tiu ricevis respektplene kaj reiris al sia propra sidloko; el la kajero li legis la nomojn unu post la aliaj kaj deklamis la

decidojn por ĉiu juĝato. La gardistoj forkondukis la juĝitojn unuope el la juĝejo. Malsimile al la juĝoj en la Reala Mondo, oni ne havas tie ĉi preparan ekzamenon, apelacion, ĉef-juĝejon, kaj advokaton sed tute simple oni donis finan juĝon, sen detala esploro.

— «Kial la juĝoj en la Intera Regno estas tiel simplaj?» — mi demandis al la disendito.

— «La juĝoj de la homoj estas ĉiam eraremaj, li respondis, ĉar la homoj ne havas eblon juĝi tion, kion ili ne povas vidi; sekve ili devas ripete kaj zorge esplori la aferojn antaŭ ol ili povas atingi decidon. La juĝon en la Intera Regno tamen donas Dio, kiu libere trarigardas la tri Mondojn; kaj konsekvence okazas absolute nenia eraro, kiel ajn simpla estas la juĝo. Plie, oni povas klare sciigi, ĉu iu estas kulpa kaj kiel peza estas la kulpo tute facile laŭ la vestokoloro fariĝinta ĉe la transiro de la serpenta rivero, kaj sekve tute ne estas necese longe esplori.

Post la juĝodonado, la regnestro kviete stariĝis kaj reiris al sia ĉambro. Min li petis veni kun li, kaj kiam mi levis timeme kaj adome la kapon por lin rigardi, mi trovis, je mia granda miro, ke liaj trajtoj denove estis fariĝintaj same ĝentilaj, mildaj kaj noblaj kiel antaŭe.

Oni legas en la Sankta Skribo de la Fondintino Nao Deguĉi:

«Mi estas la Spirito de Uŝitora-no-Kon-
ĝjin (Kreinto de la tero), kiu estas konsi-
derata ĝis nun kiel demono, pro mistera
intenco de la Granda Dio. Mi estas gra-
cia, ĝentila kaj bonega dio antaŭ justa kaj
sincera homo, sed antaŭ egoisto, malpia
kaj ambicia homo aspektas timiga.»

Kiam mi legis tiujn vortojn por la unua fojo en Ajabe, ĉe mi reviviĝis la memoro pri la regnestro renkontita en la Intera Regno. Renkontante sinjorinon Nao Deguĉi, la Fondintinon de Oomoto, kiu estas gracia, afabla kun noblaj staturo kaj vizaĝo, mi tuj rememoris la grandan regnestron.

Nun, li ekstaris, premis forte al mi la manon kaj parolis kun larmoj en la okuloj:

— «Komencu do, Spirito de la Trifolia Azaleo, la asketan praktikon en la Mal-luma Regno. Tiu, kiu estos la Mesio de la Mondo, Materia kaj Spiritita devas antaŭe ekzercadi sintene. Mi ja volus proponi al vi almenaŭ tason da varma akvo, tamen akvotrinko estas malpermasata dum la asketisma praktikado. Rapidu do al via tasko!»

Lia voĉo prenis kvazaŭ ploran tonon. Mia vilaĝo-gardodio diris al la Estro: — «Mi lasas lin al via zorgo, adiaŭ!» kaj li forflugis ien, eĉ ne rigadante malantaŭen, en nuboj, la disendito salutis al la regnestro kaj ankaŭ foriris, dirante neniun vorton al mi.

Lasite sola mi iom konfuziĝis. La mieno de la Estro subite ŝanĝiĝis: la buŝo fendigis ĝis la oreloj, la okuloj spegule brilis kaj li fariĝis, tiel terura, ke lin rigardi mi ne povis toleri. Tiam la oficistoj-dioj aperis kune kun la gardistoj, deprenis mian blankan veston, surmetis anstataŭe grizan kaj forpelis min tra la unua pordego.

Mi rigardis ĉirkaŭen kaj trovis, ke mi staras sur mallarĝa, malpura vojeto plenkovrita de velkintaj herboj, kiuj staris rekte kvazaŭ glaciaj pingloj. Mi povis marŝi nek antaŭen, nek posten; ambaŭflanke troviĝis profunda kaj vasta fosaĵo plena de vermoj plej abomenindaj.

Sur la ĉielo ŝvelis nigraj nuboj, el kiuj elrigardis malsupren terure aspektanta demonsimila estaĵo. Malantaŭ mi staris gardisto vestita per flav-bruna livreo, preta

min trapiki, ĉiumomente, per akra lanco, kies pinto estis krucoforma. Mi do ne povis fari alion ol marŝi antaŭen; efektive mi troviĝis en malfacilega situacio.

Je duonmejla distanco de tie troviĝis vasta rivero profunda, sen ponto super ĝi. Kiam mi direktis la rigardon al la akvo, kiu ŝajnis esti miksaĵo de sango kaj puso, mi trovis en ĝi ĝemantan de doloro vojaĝanton, ĉirkaŭ kies tuta korpo svarmis amaso da hirudoj, kiuj suĉadis lian sangon. Restis nenia rimedo por mi krom transiri tiun malŝatindan riveron; sed kiel mi povus tion fari sen flugiloj? Diable ruĝvizaĝa gardisto nun alkuris al mi de malantaŭe kun akra pikilo en la manoj: mi staris nun, kiel oni kutime diras, inter diablo kaj profunda maro.

Tiam mi rememoris la libron donitan al mi antaŭ iom da tempo de mia hajma gardodio; mi prenis ĝin el la poŝo, kaj legis la vortojn bele skribitajn per nigra inko: «Dio plej potenca! Kannagara Tamaĉihaemase!».

Mi elparolis senkonscie tiun frazon kaj jen, en tiu momento mi min trovis sur la alia bordo de la rivero.

La gardisto tiam reiris sian vojon returnen, dum mi trankvile paŝis antaŭen. Fariĝis nun subite malvarmege: la manoj kaj la piedoj sensentiĝis. Mi ekvidis oran lumon en la aero, kaj dum mi estis mirigita, la ora glovo falis al la tero apud miaj piedoj.

§ 8 APERO DE DIINO

Tute miigite mi fiksas mian rigardon al la ore brilanta lumo, aperinta tiel mistere antaŭ mi; kaj ial mi sentis min fortigita anime. La globo fariĝis ĉiam pli kaj pli granda, kristale travidebla, kaj fine ĝi sin transformis en belan figuron de diino. Orkolora, pura, nobla afablega, vestita blanke kun skarлата jupo la diino prenis al mi la manojn kaj diris kun ridetanta trajto ĉirkaŭ ŝia bela buŝo.

— «Mi estas diino el malpura loko. Mi donas tion ĉi al vi.»

Kaj ŝi elprenis el la poŝo «hire» (Dia ilo por forpeli diablon), kiun ĝi donis al mi. Dirinte «ĝis la revido» al mi, la diino denove prenis sian antaŭan formon de ora globo kaj forflugis fulmorapide en nuboj ĉielen.

En tiu tempo mi ne povis ankoraŭ komoreni, kiu estas la diino, pro kio ŝi donis al mi tian trezoron, malsuprenfluginte sur tian solecan regionon. Tamen post mia vizito al Ajabe tiuj ĉi miaj duboj tute klariĝis al mi. La Fondintino Nao Deguĉi diris:

— «La diino Kinkacukane estas orkolora: «ŝi estas diino gardanta la Teron, kaj estis «longe humiligata kaj mallibere enfermata «kvazaŭ en necesejo de la Universo, submetante sin dumtempe al ĉiaj suferoj kaj «mizeroj. Fine tamen, post longaj jaroj «da suferado ŝi nun eliris al tiu situacio. «Ŝi ja estas destinita plenumi gravan taskon «donitan de Dio. Homo, same kiel la diino, devas sin eduki tiel humile, ke li «volonte purigu eĉ la necesejon de domo, «se li volas esti humila servanto de Dio. «La homoj en la nuna tempo estas spirite «tute degradiĝintaj kaj ili nur aspiras altan «rangan kaj facilan laboron. Por vere servi «al Dio kaj por povi vere ludi gravajn rolojn en la granda Dia Enterpreno, t. e. la «proksimiĝanta reformo al la mondo, la «homj devas esti pretaj renkonti kuraĝe ĉiam provon kaj akcepti kian ajn «humiligon.»

Cetere oni trovas ĉie en la Sankta Skribo similajn admonojn. Mi do plene komprenis la kaŝitan volon kaj la profundajn instruojn de Dio.

Lasite sola de la diino, mi piediri sur la vasta kampo. Ne estis suno, nek luno aŭ steloj sur la ĉielo.

Apud la vojo kuŝis malpurega marĉo, en kiu baraktis belaspekta viro havanta aĝon de ĉirkaŭ tridek jaroj, atakata ĉirkaŭe de diversaj vermoj: nur la vizaĝo restis ne difektiĝa, sed sur la tuta cetera korpo

svarmis tervermoj. Dum mi tie rigardis lin, li, kune kun la parto vizaĝa, rapide transformiĝis en milojn da larvoj. Senvole mi eldiris dudoje: «Dio plej potenca! Kanagara Tamaĉihaemase!»

Kaj mirinde! li refariĝis la antaŭa bela junulo: Li elrampis el la marĉo kaj esprimis al mi sian koregan dankon kun ĝoja mieno. La junulo diris:

— Iu el miaj prapatroj perforte malvirigis drank-virinon; kaj ankaŭ mi lia posteulo, faris la saman pekon laŭ la malbeninda ligiteco. Mi sekve devis travivi tian suferon. Nun mi dankegas al vi, estimata sinjoro, pro tio, ke vi savis min el tiu terura suferado per viaj divortoj.»

Mi daŭrigis la marŝadon antaŭen sur la kampo, recitante al mi fervore la nomon de la Granda Dio. La luno sin kaŝis post nuboj, eĉ korvoj ne blekis en la aero. Densa nebulo kuŝis sur la tuta tero. Tranĉanta malvarmo. La membroj de mia korpo perdis sian sentkapablon. Mi preĝis tutkore: «Dio plej potenca! Fravoru min per Via Vorto!»

En tiu sama momento, kiam mi eldiris la vortojn, mi eksentis varmon tra la tuta korpo tute tiel, kvazaŭ mi estus en varma akvo, dank' al difavoro. La granda Dia favoro do impresis min ne forgeseble profunde. Elfluis el la okuloj varmegaj larvoj, pro dankemo, sur la vangoj.

Marŝinte apenaŭ tri mejlojn mi atingis krutaĵojn kiun suprengrimpi estis tre malfacile. Mi do volis iri returnen, sed infero! akra lancopinto direktita al mia dorso estis min pikonta je la plej malgranda moveto malantaŭen.

«Mi lasos ĉion al Dio», mi decidis, kaj kiam mi ĵetis rigardon en la dekstran direkton, starante sur glitanta vojeto glaciĝita, mi trovis tie profundan valriveron kun rapida akvofluo. En la ĝemeganta torento aŭ naĝis, aŭ subakviĝis tre stranga neniam vidita besto tenante en sia faŭko vojaĝanton, kiu enfalis la riveron. Li kriadis

energie el sia tuta gorgo: «Helpu! helpu!» La dinomon recitis respekteme, kaj subite la abomeninda gvarpiedulo malaperis kvazaŭ nokta fantomo.

La savita vojaĝanto sin nomis Funaki. Li volonte akompanis min, kaj tial mi sentis min iom kuraĝigita. La krutaĵon mi grimpis penege ĉirkaŭ kvar mejlojn. La vojo nun mankis al ni. Mi do ekhaltis tute konfuzita sur la mallumeta vojo, kaj pripensis kiel ni povos retrovi la vojon por pluen grimpadu. Mi aŭdis tiam laŭtan voĉon, kiu, kiel ŝajnis, kriis ordone al iuj aliaj:

— «Atentu! Arestu la du virojn!»

Sekvis poste bruado. Ŝajnis, ke granda nombro da monstroj kun giganta buŝego venas ataki nin. La recito de dinomo havis nenian efikon tiun ĉi fojon. La mieno de la monstroj nun transformiĝis en vizaĝon homan. Ĉefoj eble el inter ili proksimiĝis al ni, svingante longan glavon nin mortigi; sed tamen, en tiu momento, diino blanke vestita kaj ore lumanta aperis. Ŝi diris: «Svingu la 'hire' kiun antaŭe mi donis al vi,» — kaj subite malaperis. Mi elprenis do la dian «hire» el la poŝo, kiun mi svingis en la aero supren kaj malsupren, dekstren kaj maldekstren.

Tiam la bestaĉoj iom sin retiris malproksimen. Trankviliĝo momenta. Jam en la sekva minuto aperis ankoraŭ alia besto — grandega serpento. Per unu movo ĝi englutis nin ambaŭ en sian gorgon. Duope, mi kaj la akompananto palpe antaŭeniris tra la interno de la serpentego. Ekstere estis tre malvarme, kaj nun ni sentis nin agrable varmaj interne de la bestego. Kun surdiga tondro ni tamen estis baldaŭ poste ĵetitaj malsupren kvazaŭ en profundegan fundon.

Kiam ni rekonsciiĝis, ni trovis nin kuŝantaj ĉe la baseno de ekstreme alta akvofalo. Ĉirkaŭ ni staris sennombraj kolonoj glaciaj. Ni nun sciiĝis, ke ni estis falintaj de alte malsupren sur la teron. Ĉe moveto mi vundiĝus per la ĉirkaŭstrantaj glavoj

el glacio. Mi direktis la rigadon al Funaki, mia akompananto, kiu dedaŭrinde trapikita per stalaktito, kvazaŭ fiŝo sur rostpinglo, morte suferis. Mi eldiris per ĉiuj miaj fortoj la nomon de Dio la plej potenca, haltante ĉe ĉiu silabo. La mirinda influo de la Dia nomo tuj liberigis min kaj lin el tiu malbona situacio: la akvofalo magie malaperis kaj anstataŭ ĝi vasta, senlima kam kovrita de neĝo etendiĝis antaŭ ni. El sub la neĝo aperetis piedoj, manoj kaj kapoj de centoj da homoj. Granda neĝamaso falis kun terura bruado sur min, kovrante min tute. La «hire» mi volis svingi por fari per ĝi miraklon, sed la manojn mi ne povis movi facile ĉar ili estis tute malliberigitaj.

Mi energie preĝis silabe: «Kan-na-ga-ra-ta-ma-ĉi-ha-e-ma-se,» kaj en tiu sama momento mi jam estis libera kiel birdo en la aero. Apud mi kuŝis Funaki plene kovrita de neĝo. Nur liaj haroj aperis sur la neĝo. Kiam mi svingis la «hire» kelkajn fojojn maldekstren kaj dekstren, li povis eliri el la neĝo kun peno. La ora lumo tiam aperinta en angulo de la ĉielo ĉirkaŭlumigis nin. La tuta neĝo subite malaperis kaj mallongaj herboj nun estis videblaj sur la kampo. Multege da savitaj homoj, kovritaj ĝis antaŭ momento per la profunda neĝtavolo, nun kisis la teron antaŭ mi kaj sincere dankis min kun rideto, dirante, ke mi estas la Savanto, kaj esprimis sian deziron partopreni kun mi en la granda Dia Entrepreno. Inter ili sin trovis multaj komercistoj, edukistoj, kuracistoj, sciencistoj, ktp.

La ĉi-supra rakonto priskribas miajn traviaĵojn en la unua sceno de la akva infero; en la dua kaj la tria scenoj mi renkontis eĉ pli severajn provojn, kiuj, eĉ kiam mi rememoras ilin, min tremigas.

— Mi atendas kvazaŭ amore la alvenon de Oomoto Internacia.

— Povas esti, ĉar ĝi estas interna cia.

Gaja Vendisto de Okuloj

— Hidemaru Deguĉi —

Sceno I.

... Vilaĝekstremo, de kie oni vidas montojn proksime.

Ĥoro: Antaŭ multaj multaj jaroj,
Malproksime trans la montoj,
Kaj ankoraŭ pli profunde,
Plu profunde transe, fore,
Vivis unu maljunulo.

Surportante blankan robon,

Tiam venas maljunu'o el la dekstra flanko de la scenejo.

Kun piedoj tute nudaj,
Kaj kun kan' en unu mano,
En alia valizego,
Li alvenas la vilaĝon.

Sur revena voj' de l' farmo
Jen Gonsaku:

Farmisto Gonsaku venas.

«He, ja stranga

Maljunul'! De kie estas
Vi? Kaj kien do vi iras?»

Gonsaku: «Sinjoro Avo! Kian laŭmodan valizon vi portas! Nu, kio estas en ĝi?»

Maljunulo: «Mi estas de arbaro. Mi venis por gajni monon, por vendi okulojn. Ĉu vi ne volas aĉeti?»

Gonsaku: «He, ki... kio? Okulojn vendi vi venis?!»

Ĥoro: Manplektante sur la brusto,
Jen Gonsaku mirigita,
Fiksas al li la rigardon,
Dum li el valiz' trankvile
Grandan pinĉas ho, okulon.

Maljunulo: «Mirinde bela okulo, ĉu ne? Tiu ĉi kostas por paro (li elprenas du okulojn) unu spesdekon kaj duonon, kaj mi neniam povas rabati.»

Tiam, tri farmistoj, Taromatu, Zirosuke kaj Otiyo, kiuj hazarde preterpasis tie, jam staras apud ili.

Taromatu: (Enrigardante kaj subite) «Tio

estas malkara, samkosta kun la poŝtkarto!»
Zirosuke: «Nu, Avo, kion oni profitas el tiuj okuloj?»

Otiyo: «Ĉu tio estas speciala kuracilo por ia malsano?»

Gonsaku: «Eble, per ili oni povos fari bonan supon.»

Dirante li elprenas unu okulon el la valizo.

Maljunulo: «Ne, ne! Ne tuŝu la vendajon. Tiuj ĉi estas vivaj okuloj. Nu, aŭskultu. Mi venis la longan vojon ja laŭ la ordono de la dio de Arbaro, kiu volas, ke mi interŝanĝu viajn okulojn kun tiuj ĉi novaj.»

Zirosuke: «E, Ki-i-i-o? interŝanĝi okulojn?»

Maljunulo: «Jes, ja»

Gonsaku: «Sensencaĵo! Tia afero...»

Taromatu: «Neniel povas esti ebla.»

Otiyo: «Sinjoro Avo. Eĉ se tio estus ordono de dio, neniu volus, ke oni interŝanĝu liajn proprajn okulojn, ricevatajn de la gepatroj, kun okuloj unu kaj duonspesdekojn kostaj.»

Maljunulo: Sed, tio alportas al vi grandegan feliĉon. Provu interŝanĝi viajn duonputrintajn kaj mukoplenajn okulojn kun tiuj ĉi kristale puraj, kaj tiam vi trovos la mondon tute ŝanĝita. Kaj estas treege oportune, ĉar — ekzemple, se vi ŝatas monon, povas aĉeti okulojn de «Mono»-marko, per kiuj ĉion en la mondo vi vidos mono; se vi deziras belulinon, vi aĉetos okulojn de «Belulino»-marko, tiam eĉ monstra edzino aspektos la plej bela en la mondo; tiuj, kiuj estas senĉese turmentataj de malfeliĉoj, interŝanĝos siajn okulojn kun «Rido»-markaj, kaj ili fariĝos eĉ tro ridemaj; se estas homo, kiu estas terura ridemulo kaj neniam spertis koleron, li povas aĉeti «Ploro»-markajn, kaj ĉio ŝajnos al li kvazaŭ ploranta. Krom tio, vi ne sentos eĉ plej malgrandan doloron, ĉar mi aplikos mian magion, pri kiu vi jam scias.»

Gonsaku: Sinjoro, vi tre lerte konvinkis min. Donu al mi do «Mono»-markajn — sed atentu — vere la plej bonkvalitajn. Kaj bonvolu tie ĉi tuj fari la operacion.

Taromatu: (*Mallaŭte*) «La maljunulo estas sorĉisto kaj li ankoraŭ neniam mensogis, mi scias.»

Zirosuke kaj Otiyo: «Eble ni ne estos trompataj.»

Horo: Jen li prenas el valizo
Ore brilajn «Mono»-markajn;
Tondileg' en dekstra mano
Nun minace grincas tiel,
Ke Gonsaku, malgraŭ volo
Sin retiras du tri paŝojn.

Maljunulo: (*Persekute al proksimiĝante al Gonsaku*) «Nu, tuj malfermu la okulojn!»

Gonsaku malfermas la okulojn sed tuj refermas ilin pro timo. Ridante, la maljunulo murmuras maĝio-vorton kaj alpuŝas la okulbulojn, kiujn li tenas en la maldekstra mano, sur ambaŭ dekstran kaj maldekstran okulojn de Gonsaku, unu post alia. Intertempe li grincas la tondilon nur super liaj okuloj, kaj la okuloj jam estas interŝanĝitaj.

Gonsaku: (*Ĉirkaŭrigardante malkviete*) «Ah mi vidas, vidas; bonege mi vidas. Ĉio ajn estas orkolora! Ho, strange! Ho, mirinde!»

Li dancas de ĝojo. Kaj tion vidante, Taromatu, Zirosuke kaj Otiyo ĉiuj konkure ŝvarmas al la sorĉisto.

Zirosuke: «Sinjoro avo, donu al mi Belulino-markojn.»

Otiyo: «Al mi «Rido»-markajn, mi petas.»

Taromatu: «Mi volas «Mono»-markan por la maldekstra okulo kaj «Belulino»-markan por la dektra.»

La maljunulo kvietigas ilin.

Maljunulo: «Atendu, atendu! Laŭvice laŭvice!»

Li faras operacion al ili sammaniere kiel antaŭe. Kiam finiĝas la operacio, ili respektive ekkrias.

Zirosuke: «Kia mirindaĵo! Kiel belegaj estas la montoj kaj riveroj! Ah, la kukurbaspekta vizaĝo de Otiyo komencas simili al tiu de Madono. Tie kaj ĉi tie — ĉie ja estas

sonĝe pitoreske.»

Otiyo: «O-ho-ho-ho, a-ha-ha-ha! Kial mi estas tiel ĝoja?! A-ha-ha-ha, o-ho-ho-ho! Kiel ĝoje! Kiel interese!»

Taromatu: (*Per unu mano kovrante la dekstran okulon kaj rigardante ĉirkaŭen nur per la maldekstra*). «Oh, eĉ la fekaĵo de ĉevalo vidiĝas maso da oro! La ŝtonetoj sur vojo ĉiuj estas or- aŭ arĝentmoneroj! — Ho jes, nun mi provu per la alia... (*Ĉi-foje malfermite la dekstran okulon*) Oh, eĉ la variolsigno-plena vizaĝo de Otiyo aspektas vizaĝo de anĝelino.»

Li admire rigardas Otiyo'n de malsupre.

Maljunulo: «Oh, oh, tre bone, ke la deziro de vi ĉiuj estas plenumitaj. Nu, por gratulo vi ĉiuj kune dancu, dum mi kantos akompane.»

Kvar: «Bone, bone!»

La kvar personoj komencas kune danci per lertaj movoj, akorde al la kanto. La maljunulo taktas frapante la manojn.

Kanto: «Ĝoju, ĝoju, ĝoju, karaj geamikoj!

Se per «Belulino»-marka oni vidas,
Eĉ edzin' kukurb-aspekta ekŝanĝiĝas
Ja en tiun de Madono, kaj la monstra
Maljunulinaĉo eĉ en anĝelinon.

Ĝoju, ĝoju, ĝoju, karaj geamikoj!
Se portante «Rido»-markan oni vidas,
Jen ridegas Zeŭso tondre el tutgorĝo,
Kaj similas jen diablo je Budao.
Ĝoju, ĝoju, ĝoju, karaj geamikoj!
Se havante «Mono»-markan oni vidas,
Eĉ ĉevala fek' aspektas oramaso,
Kaj folioj ĉie-lokaj papermonas.

La kvar personoj ĥoras, kun alia melodio.

Koran dankon, Dio de Arbaro!
Koran dankon, Avo de Arbaro!
Kun valizo plena de okuloj
Ankaŭ morgaŭ vi al ni revenu.

La maljunulo dekstren de la scenejo, kaj la aliaj maldekstren respektive foriras.

... Kurteno ...

(Trad. Isao Inoue.)

JAPANO

(El «Vojaĝlibro» de Filozofo) (3)

— Grafo Hermann KEYSERLING —

En la monakejo de Koja-San

(2)

Mi vizitas la sanktajn lokojn kun la aliaj pilgrimantoj, kiuj supreniris kun mi al Koja. Kiel tiuj ĉi pligrimantoj malsimilas tiujn de Hindujo! Nur sufiĉe aĝaj virinoj ŝajnas konsideri sian vojaĝon serioza en religia senco; la junulinoj konsideras ĝin simile kiel la viroj — gaja feria ekskurso, dum kiu multaj novaĵoj estas videblaj, kaj ili portas pilgriman kostumon ĉefe pro sento pri stilo aŭ pro plezuro karnavaleca. Ili aŭskultas la legendojn kaj la mirindajn rakontojn rilatantajn al la unuopaj temploj kun tiu duon-skeptika kredemeco, kun kiu nematuraj infanoj aŭskultas ferakontojn, kaj la sento de pieco, kiu kaptas ilin en la loko, kie Kobo Daiŝi, la fondinto de l' monakejo, granda magiulo kaj miraklo-faranto, tradicie estas, atendante la tagon de sia reviviĝo, enhavas pli da scivolemo ol religia sindono. Nu, kion la Koja-pilgrimanto devus kredi, estas vere iom troa. La Ŝingon-sekto, al kiu apartenas tiu ĉi monakejo, praktikas pli da magio, ol iu ajn alia, kaj la nuntempaj Japanoj konsideras tiujn ĉi kutimojn tre skeptike. Eĉ la pastroj ne ŝajnas tre alte taksi sian propran kulton. Ili preferas paroli pri Fichte kaj Kant, kaj ili fuĝas miajn demandojn rilate al dogmo kaj kulto kun ĝentila rideto. Sed ĉiuj pastroj same kiel kongregacio, partoprenas la religiajn ceremoniojn; eĉ ne unu el ili emas «fuŝi la aferon». Ili ĉiuj posedas tro da formo-sento por ne partopreni ĉiujn ritojn kun artisma seriozeco. Ilia seriozeco estas verdire tiu de l' komediisto, kiu alprenis sian rolon per sia tuta koro. Ĉi tiun matenon mi mankis la fruan diservon en la templo, kie mi restadas. Kiam mi esprimis mian bedaŭron al la abato, li tuj deklaris sin preta ĝin celebri denove por mi, ĉar la tre antikva rito, kiu versajne venis el Egipujo, certe interesus min. Ĉi

tio estis, nature, pro ĝentileco, kaj mi estas tutkore dankema al li, despli ĉar tiu ĉi diservo estis unu el la plej rimarkindaj, el tiuj kiujn mi iam ĉeestis. Tamen, mi dubas, ĉu sacerdoto, kiu estas vere sincera, irus tiel malproksimen pro simpla ĝentileco.

Estas tute ĝuste; mankas al la japana menso religia profundeco laŭ la hinda senco. Nenie mi sentas ion el la interna sperto, kiu aliformigas la trajtojn de l' pilgrimantoj en Benares aŭ Remeŝavaram; kaj la konversacio, kiun mi havis kun la pastroj pri la Mahajana — doktrino, nenion novan instruis al mi. Kaj tamen, Budaismo en Japanujo ŝajnas havi multe pli vivan influon ol mi kredus post la unuaj hazardaj impresoj. La Japanoj ne estas religiaj laŭ la hinda senco, nek laŭ la Kristana, ĉar mankas al ili profundo de agnosko kaj imagaj povoj; kiam ili ne pensas, ili kredas, kiel simpluloj faras ĉie, sub certaj miraklaj faktoj kaj cirkonstancoj; kaj kiam ili lernis pensi, ili komencas dubi. Sed la procezoj de pensado ne estas esencaj al la Japanoj: kio estas plej esenca, plej profunda en ili, aperas en ilia sensado. Mi diras en «sensado», ne en sentado, animo, koro; t. e. en la maniero, en kiu la surfaco, ne la profundo, de ilia psiko respondas al la impresoj de l' interna kaj ekstera mondoj. La interna vivo de l' Japanoj okazas ĝenerale en la limoj de l' sensado, same kiel ĉe infanoj kaj junaj virinoj. Ĉi tie, ankaŭ, ilia religieco estas esprimata. La kredo de infano ne estas profunda kredo, kaj tamen ĝi rekte kondukas al Dio. Tia kredmaniero tamen estas la plej aminda el ĉiuj. Same, la japana religieco, kiu rigardate el la vidpunkto de l' spirito, aperas supraĵa, kreis realecojn en la limoj de l' sensado kaj en la sfero de l' animstatoj, kiuj apartenas al la plej karaj trezoroj de l' homa raso. Estas nenio pli dolĉa ol la religia lirismo de la lando de l' Leviganta Suno, nenio pli bela ol la

koncepto pri amo simboligata de Amida kaj kaj Kūannon, nenio pli ingenie* delikata ol la koncepto, kiun la japana Budaismo asocias kun vivo kaj morto. La misiistoj, kiuj komprenas Kristanismon plej profunde, kaj kiuj ankaŭ plej profunde penetris la pli altajn formojn de Budaismo, estas, konsekvence, unuanimaj en la konvinko, ke se niaj ideoj pri diaj graco kaj amo estas pli profundaj en si mem, la japanaj ideoj kaj esprimoj pri la samaj kvalitoj estas pli belaj. La procezo de l' konkretigo okazas en la sfero de l' sensado; en tiu ĉi sfero la Japanoj staras, eble, pli alte ol iuj aliaj homoj. Ne estas mirinde, do, ke en sia individua kazo, malgraŭ sia esenca supraĵeco, ili superas ĉiujn, kuncerne la povon pri religia sensado. Ĉi tio estas vera superĉio, pri la japana virino: mi neniam kontentiĝas rigardi tiujn ĉarmegajn infaninojn kiuj riverencas, plenaj de respekto, antaŭ la oraj tabuletoj. Ili nenion scias pri kredo laŭ la hinda senco; ili verŝajne eĉ ne scias ĉu ili estas kredantoj; ili ridas, kie ili devas esti seriozaj: kaj tamen, ili estas sendube animataj per la sama amo, kies idealo estas entenata en Avalokitesvara.* Mi preskaŭ emas daklari, ke ili ĉiuj sentas, kiel en Hindujo eble nur Kriŝna aŭ kiel sankta Francisko de Asizo sentis inter ni; kaj en ilia ekzisto, kiu estas tiel preta al sinofero, en iliaj rilatoj al tiuj, kiuj estas plej proksimaj al ili, ili ĉiutage praktikadas tion, kio estas super ilia komprenpovo.



La samaj pilgrimantoj, kiuj montris tiel malg-andan senton pri soleno dum la vizito al la budaisma sanktejo, ŝajnas esti profunde tuŝataj kiam eksperta gvidisto kondukas ilin tra l' tombejo. Estas la plej impresiga tombejo, kiun mi iam vidis; neniu eŭropa lando posedas similan monumenton de patriota pieco. Mi iras tra avenuo da gigantaj cedroj, pli ol unu mejlon longa ĝis trans la pinto de *Koĵa*, ĉe ĉiu ŝtona monumento, starigita al la memoro de individuo aŭ familio, nia gvidisto haltas kaj vokas la nomon. Ĉiuj tiuj nomoj estas koneksaj al la historio de Japanujo kaj neniu el ĝiaj grandaj filoj mankas. La famaj

*daimio**-klanoj estas reprezentataj tie ĉi per ŝtono; same la grandaj militaj gvidantoj kaj la eminentaj ŝtatviroj. Ne ĉiuj estas vere enterigitaj en *Koĵa*, sed ĉiu havas sian tombŝtonon tie ĉi, konsekvence ŝajnas kvazaŭ la tuta Japanujo ripozus tie ĉi... Mi rigardas la pilgrimantojn, kiuj antaŭ nelonge ridis kaj babilis tiel facilanime. Ili ŝajnas nun kvazaŭ transformitaj. Ilia plej interna profundo estas tuŝita. La delikata surfaco estas penetrita de profunda seriozeco.

Tie ĉi por la unua fojo mi kontaktiĝis kun la animo de Japanujo. Ĝi ne aperas en la rilato de l' individuo al Dio, nek en la kredo pri transcenda realo, nek en la percepto pri la lasta en penso aŭ vivo: ĝi esprimiĝas en la rilato de l' japanoj al Japanujo. Patriotismo estas la plej profunda faktoro ĉe l' japanujo. Ilia rilato al la patrujo, ĝia grandeco, la daŭrigo de ĝia glora ekzistado, signifas por ili kion la rilato al Bramo signifas por la hindoj, kion membreco al la universala ordo signifas por la ĉinoj. Ne estas facile por ni penetri en tiun ĉi kvaliton de profundeco; ĝi jam ne estas profunda por ni. Sed ĉiu konis mementojn dum kiuj sentoj pri malproksimega pasinto nekontraŭstareble alkuris el malluma fonto en la konscion; en kiuj sangparenceco kaj nacia solidareco ŝajnas esti pli profundaj ligiloj ol la rilatoj al Dio aŭ al la Universo. En tiuj ĉi momentoj oni estis simila al la japanoj.

Tiu, kiu povas viziigi al si la animon de l' japanoj per la sperto de tiaj kondiĉoj, ne plu konsideros ĝin kiel supraĵan: li agnoskos, ke la plej granda profundeco kaj ekstreteco devenas de ĝi. Ĝi tamen parolas lingvon, kiu estas fremda al ni. Ni ne povas adori ion konkretan kiel plej profundan signifon. Por ni lojaleco neniam povas fariĝi lasta instanco, ni povas kompreni la metafizikan unuecon de lando, popolo, ŝtato, nacio, familio kaj reganta dinastio, kiuj estas ĉiam ankoraŭ la fundamentaj antaŭkondiĉoj de ĉiu ne tro okcidentigita japano, nur per nia intelekto, kaj eĉ ne la plej patriota moderna eŭropano spertis, en pactempo, la senton pri absoluta morala devo al sia patrujo kiel tia. La sento, kiu

emanas el la versoj de *Take Hirose*, la heroo de *Port Arthur* :

«Tiel senfine kiel la kupolo de
l' ĉielo super ni
Estas la devo, kiun ni ŝuldas al
nia Imperiestro ;
Nemezurebla, kiel la profunda ma-
ro sub ni.
Estas la devo, kiun ni ŝuldas al
nia patrujo :
La tempo venis por ni pagi niajn
ŝuldojn.»

Li nur rekonos tiun ĉi senton, kiam militdanĝero por iom da tempo ŝanĝas lian konscimanieron, kiam la mondo estas transformita en ĉelon de l' nacia korpo, kiam, por iom da tempo, li ĉesis ekzisti kiel aŭtonoma individueco. Por li, la individueco. Por li, la individua animo estas la fina tera vesto de metafizika realo. Ĉiuj idealaj demandoj rilatas al ĝi, kaj kompare al ĝi eĉ la patrujo ŝajnas esti io supraĵa. Ĝi estas supraĵa, juĝata per la normo de l' scia spirito, sed tio ne necese, implicas, ke homoj sentantaj kiel la japanoj estas persone supraĵaj; ilia patrujamo signifas ekstremecon de profundeco. Ĉiu vivesprimo estas profunda, kiu radikigaĝas en la principo de l' vivo. Nur pro tiu ĉi kaŭzo, tiaj pensoj estas profundaj, kiuj reiras objekte al la bazo de aferoj — t. e. vere profundaj ideoj en la ordinara senco de l' vortoj; sed en la sfero de l' volado kaj sentado, profundeco estas sendependa de objektiva profundeco; tie ĝi dependas de l' grado laŭ kiu subjektiva apero respegulas subjektivan estadon. Nu, la subjektiveco de l' japanoj estas difinita per la ideoj kaj sentoj ĉi-supre priskribitaj; por ili nenio ekzistas super tiuj. Konsekvence, ili estas profundaj rilate al tiuj. Esence supraĵa popolo estus nek venkinta la gigantan Rusan Imperion, nek ĝi estus havinta, super ĉio, la persiston kaj kuraĝon de ofero, kiu estis necesa por sin reorganizi komplete en la daŭro de tridek jaroj.

La plej profundaj kvalitoj de l' japanoj ostas esprimitaj en patriotismo. Tiu ĉi profundeco rigardata el la vidpunkto de l' menso, estas sendube supraĵa, kaj tiurilate la ĝenerala juĝo pri ili, nome ke profundeco mankas al ili, estas pravigita. Ĉie kie apero ne povas esti rilatigata al la vivanta fono, al Japanujo, iliaj kompreno kaj kapablo fiaskos. La japanoj nek estas profundaj, nek ili kapablas esti tiaj, ĉu religie, laŭ la senco de l' hindoj, aŭ filozofie, laŭ la senco de l' germanoj, aŭ pli ĝenerale, laŭ iu ajn spekulativa senco. Sed tie ĉi, se ie, la vero evidentiĝas, ke ĉiu apero en siaj limoj povas esprimi *Atman*.* La perfekteco de l' rozo signifas la samon antaŭ Dio kiel tiu de Budao; la unua estas pli proksima al Dio ol la dua antaŭ ol li fariĝis perfekta. Same la perfekta patriotismo de l' japanoj valoras pli metafizike, ol la pli alta kompreno de l' okcidentulo, kiu haltas duonvoje. Kaj plie, la perfekteco de l' rozo estas io absoluta: neniu homo iam atingos ĝin; laŭ la senco de l' rozo, homo staras sub ĝi. Tiel, la individuecaj kaj profunde pensantaj homoj, kie la escepta kondiĉo de nacia milito ne evoluigas ilin regrese, estas malsuperaj, kiel patriotoj, al la japanoj. La hindoj, pri kiuj mi pensas, estas tute senpatriotecaj, ĉar ilia konscio rigardas manifestiĝojn profunde malsuperaj al ili, same la ĉinoj, ĉar ilia idealo pri Ĉinujo estas tro alta por esti tuŝata de l' akcidentoj de l' historio; sed ni, blankuloj, iam forte similaj al la japanoj, fariĝos laŭgrade malpli patriotaj laŭ ilia kompreno (malgraŭ la ŝajno de l' kontraŭo, kaŭzita de l' aŭtomata aktiveco de l' konscia spirito, kiu elvokas korespondajn emociojn per rimedoj de nacionalisma teorio kaj ankaŭ per la solidareco de ĉiuj interesoj en la moderna ŝtato), ĉar ies naskiĝlando ne pli povas implici ekstrememon ĉe la komplete individueciĝinta ol ĉe la plej profunda homo, ĉar individualismo necese kreas mond-civitanekon. Tio estas progreso el la vidpunkto de l' agnosko. Samtempe tio malfortigas fiziologian

koheron. La Japanujo de l' hieraŭo estas pli proksima ol nia estoŭto al la ideala nacia kohero.

Mi studas la fizionomion de kelkaj oficiroj, kiuj estas min akompanantaj tra l' tombejo; ili estas nedubbele *samrajoj*.^{*} En iliaj okuloj brilas mondkompreno, kiun posedas en Eŭropo nur postumaj^{*} filoj de pasintaj jarcentoj. Mi informiĝis pri speciale grandioza monumento, antaŭ nelonge starigita. Ĝi estis al la memoro de tiuj, kiuj falis en la Manĉuria Milito, Rusoj same kiel Japanoj. Estas la plej nobla kvalito de kvalireco honorigi la malamikon.

Nara

Mi nun ĝuas religian arton. Laŭ mia sento, Budaismo produktis la plej altan de tiu ĉi speco sur la tero kaj multaj el ĝiaj plej gloraj monumentoj troviĝas en Japanujo, en kaj ĉirkaŭ *Nara* kaj *Kioto*. Kiel nespiritaj aperas la plej altaj manifestiĝoj de l' kristana imago apud tiuj pentraĵoj, sur kiuj Amida, enkorpiganta la ideon de lumo, transfiguras la teran mallumon, leviĝante kiel suno super montaroj, aŭ apud tiuj meditemaj kaj bonfaraj Budaĵoj, en kiuj la paco de l' animo trovis sian definitivitan esprimon! Rilate al la profundeco de l' sento la simplaj artistoj de nia frua Mezepoko estis verŝajne ne sub la Budaĵoj, sed ilia sento rompiĝis kontraŭ la racio. Ili estis edukitaj por konsideri la manifestiĝojn de sia kredo ĉu laŭlitere — kiel historiajn aŭ eĉ sciencajn faktojn kiuj, kiel tiaj, signifis ion finan aŭ interpreti ilin alegorie, kaj ambaŭ tiuj ĉi sintenoj igis rektecon neebla. En maloftaj okazoj iliaj religiaj sentoj tamen esprimiĝis rekte en la kreado de bibliaj scenoj kaj la efekto estas tiuokaze despli kortuŝa; la plej-multo de iliaj verkoj estas nur malrektaj esprimoj. La Budaĵoj, kiel ĉiuj posteuloj de l' hinda spirito, neniam konsideris dogmojn kaj mitojn pli ol esprimrimedojn. Pro tio, budaismaj artistoj povis sukcesi tie, kie estis neeble por Kristanoj.

Verŝajne ĉiuj fundamentaj konceptoj de l' ekstremorienta religia arto havas hindan aŭ greko-hindan originon, kaj kio estis konservita en *Borobodur* kaj *Angkor yat* pruvas per si mem, ke la hindoj iam antikke estis ankaŭ grandaj kiel skulptistoj. Tamen, la plej altaj enkorpiĝoj de ilia arta volado, kiuj estas konservitaj por ni, ne estas iliaj verkoj. La plej grava religia arto de l' Oriento estis kreata de ĉinaj majstroj, kaj iliaj ideoj trovis la plej fekundan grundon ne en Ĉinujo sed en Japanujo. Estas signo de profunda miskompreno konstante montri la fakton, ke la japana arto ne estas indiĝena: neniu arto iam estis indiĝena; la greka, same kiel la ĉina skulptado dependis de fremdaj landoj ĉar ilia plej alta evoluo komenciĝis nur post kiam fremda stimulo fekundigis la indiĝenan genion. Estas vere, ke la japana religia arto estis dependa de siaj ekzemploj ĝisfine, ke ĝi neniam rivalis ilin kaj evoluigis nenion novan el la malnova; tiusence oni ne povas ĝin kompari honeste al la ĉina arto. Sed ĝi estas tamen tute originala, vera esprimo de interneco; verdire la lasta estas vere ol en Ĉinujo. Oni ne necese devas inventi la plej konvenan esprimformon; oni ne bezonas ŝanĝi kion oni heredis, tiel ke ĝi korespondu al sia personeco. Preskaŭ la tuta Oriento uzas citaĵon kiam ĝi deziras esprimi, rektan, personan sperton kaj tio ĉi ne signifas, kiel ĉe ni, senpovecon aŭ mankon de gusto: tio signifas, ke animoj rekonas sin mem en certaj eternaj manifestiĝoj, en identaj formoj, kun nemalpligrandigita originaleco. La formomondo de l' budaisma arto korespondas al la japana budaisma religieco tiel komplete, kiel ĝi verŝajne nun korespondis en esceptaj animoj de Ĉinujo, kiu jam estis tute *konfucianigita* ne gravas, ĉu tiu ĉi korespondo ekzistis antaŭe, aŭ ĉu ĝi estis, kontraŭe, kreita aŭposteriore per la influo de Budaismo sur la japana animo, ĝi reprezentas fidelan bildon pri la spirita vivo en Japanujo. Estas japana kaj ne ĉina animstato, kiu parolas

* *postuma*, laŭ F.-L. traduko de la angla «*posthumous*» (vidu ankaŭ en *Glosavo*).



← Pitoreska lago de Sarusaŭa en Nara.

Cervoj en Nara-parko. →



el la molaj *Kannon*-penetraĵoj, la diskretaj kaj tamen riĉaj kromataĵoj de *Mandaras* estas respeguliĝo de la japana, ne de l' ĉina interneco. Oni devas diri, ke ĉiuj formoj kaj koloroj ĝislaste estis inventitaj sur la kontinento kaj se ne estus Japanoj por adopti ilin, la lasta ebla konekso inter arto kaj vivo estus restinta nerilatigita. En Japanujo, budaisma arto fariĝas la normala esprimo de religia sento: por unu *Fra Angeliko* en *Tuskanujo*, estis centoj tie ĉi. Multaj sanktuloj kaj patriarkoj de l' Eklezio estis samtempe pentristoj kaj skulptistoj; la plimulto de l' statuoj kaj penetraĵoj montrataj en la malnovaj temploj estis kreataj de pastroj kaj monakoj.

Oni kontraŭdiros tie ĉi: sed la japanoj ne estas spiritecaj; kiel povus esti, ke la plej spiriteca el ĉiuj artoj konvenas al ili? Al tio oni povas respondi, komence sin-

gardeme, ke se la modernaj japanoj estas malofte spiritecaj, tio ne pruvas, ke ĉiam estis same. La koncepto pri iu popolo, pri iu raso, korespondas al difinita ideo nur en difinitaj templimoj. La judoj de l' hodiaŭo certe ne kreus Bibliion, la amerikaj negocistoj de l' dudeka jarcento ne permesas diveni, ke iliaj prapatroj fuĝis trans la oceanon pro religiaj motivoj por fondi regnon de sanktuloj surtere. Pura sango povas esti konsiderata kiel konstanta faktoro en tia ekvacio, sed varieblaj faktoroj ankaŭ agas, ne malofte, ili decidas. La variebla faktoro de Kristanismo, dum jarcentoj malgraŭ ĉiuj ekzistantaj konstantaj faktoroj, unuigis la plej malsamajn rasojn de l' Okcidento tiagrade, ke ne-Eŭropano povas apenaŭ distingi unu de la aliaj. Budaismo faris ion similan. La lasta, konforme al sia pli mola naturo, tute ne inf-

luis la eksteran vivon tiel potence. Aliparte, ĝia pli granda spiriteco kondukis al rezultatoj, kiujn Kristanismo neniam atingis laŭ la sama grado: ĝi spiritizis* popolojn, kiuj laŭ sia naturo ne estis spiritecaj, aŭ ĝi tiel faris almenaŭ en iuj el siaj esprimoj. La kontraŭ-metafizikaj ĉinoj leviĝis kiel budaismaj artistoj al altecoj de metafizika scio, kiujn neniu alia popolo atingis; kaj la japanoj, kies mensa konstanta faktoro kiel raso estis verŝajne ĉiam laŭfakteca, estis iluminataj per la lumo de *Mahajana** dum jarcentoj tiagrade, ke ĝuste ilia laŭfakteco kondukis al spiritecaj kreaĵoj. Post ĉio, religia, sperto estas io tute same empiria kiel la sperto de infano pri la mondo; ĝi nur okazas en malsama sfero, la eniro al kiu, tamen, estas libera al ĉiuj. Unu lumradio de l' juvelo sur la frunto de Budao montris tiun ĉi eniron al la japanoj. Tiel longe, ke ili estis iluminataj per ĝi, ili povis admiri kaj atingi diecon.

Hodiaŭ, antaŭ la gloro de *Nara*, mi almenaŭ vidis la problemon klare, kiu okupis min ekde *Koĵa*: kiel eblas, ke la japanoj, kiuj «ne scias kion ili faras», povas esti rigardataj multmaniere kiel perfektigantoj de l' idealo de l' hindaj saĝuloj: tio estas rekte koneksa kun la fakto, ke la ĉiosciaj hindoj apenaŭ iam esprimis sin laŭ maniero inda al si, kaj io simila estas vera pri la germanoj; ke ĝisnun, la plej eternaj manifestiĝoj de l' eŭropa spirito ne venas de la plej profundaj *teŭtonoj* sed de la latinidaj popoloj; kaj tio signifas, ke la plej alta esprimo de spiriteco estas neniam trovebla ĉe spiriteco, sed ĉe materiece pensantaj homoj. (Mi uzas tie ĉi la koncepton «materieca», nature, laŭ multe pli vasta senco ol kutime; kiel ĝenerala priskribo por ĉiu mensa tendenco kiu okazas en la direkto de apero kiel tia).

La kontrolo pri materio postulas organojn kiuj perfekte kapablas mastri ĝin, speciale, plene evoluintajn sensojn; la menso, kiel tia, ne sufiĉas. Ĉar unu homo neniam estas ekipita same perfekte per menso kaj

per sensoj — estas, por tiel diri, antinomia rilato inter ĉi tiuj du aspektoj — la materieca individuo estas plej sukcesa en la mondo de aperoj. Sed la esprimo pri ĉe spiritecaj signifoj apartenas, ĉiuokaze, al la sfero de fenomenoj; la plej bona esprimo estas trovata ne per tiu, kiu estas plej penetrita de spirito, sed per tiu, kiu scias plej bone kiel materiigi spiriton. Kaj tia homo estas materialisto. Li neniam agnoskas spiritan kvaliton kiel tian, sed ŝe lia atento estas tirata al ĝi, li ĝin kaptas tiam: kaj pro tio, la plej bona esprimo pri spiritecaj veroj devenas de poetoj, ne de sanktuloj kaj filozofoj. La spirito, tamen, ĉeestas en ĉiu individuo; ĉiu konas la spiriton, ĉu konscie aŭ male. Tio klarigas, kial mateliecaj homoj, al kiuj neniu spiriteca vero iam malkaŝiĝus, komprenis kaj ekŝatis ĝiajn esprimojn, tuj kiam ili familiariĝis kun ili. La supera Budaismo renkontis tujan komprenon en Ĉinujo kaj Japanujo, kaj gajnis tie, baldaŭ poste, siajn plej sublimajn esprimformojn, ĉar la popoloj de l' Ekstremoriento posedas senkomparan esprimkapablon, kaj ĉar tiuj fundamentaj ideoj, kiujn ili neniam estus konceptintaj solaj, jam ekzistas. La materieca temperamento de l' ĉinoj kaj japanoj, konsekvenca, ne prezentas enigmon rilate al la religieca arto, sed, kontraŭe, klarigas ĝin. Kio koncernas speciale Japanujon, ĝi montras al ĉinujo la tipan rilaton de l' disĉiplo kompletiganta la verkon de l' majstro. La pioniro enue faras sian vojon tra materialo; malofte vivas sufiĉe longe por sin esprimi komplete kaj malofte zorgas pri definitiva esprimo. Disĉiplo komencante kie la majstro haltis, plenumas kion li skizis kaj se li havas subtilan menson, komprenante la specialan funkcion de formo, plue, posedante guston kaj senton pri nuancoj kaj akraj lumoj, estas lia privilegio perfektigi la koncepton de l' majstro al ĝia plej alta perfekteco, kiu, kiel tia, estas multe tro super liaj povoj.

(*dairigota*)

Pri la du Akademioj en Parizo

— Jozefo Major —

Por kiuj ne havas talenton diveni enigmojn mi klarigas, ke mi aludas al la Esperantista Akademio kaj al la... Franca Akademio. Kia estas la rilato, oni sin demandas. Tion montri estas mia celo hodiaŭ.

La Franca Akademio fondiĝis ĝuste antaŭ tri jarcentoj kaj laŭ la statutoj ĝia celo kaj tasko estas *doni regulojn certajn al la franca lingvo, kunmeti vortaron plenan, gramatikon, retorikon, poetikon*.

De tri jarcentoj la «kvardek nemortuloj» laboradas sed nur du punktoj de la programo estas pli-malpli plenumitaj: vortaro kaj gramatiko. La nova eldono de la vortaro estas nun redaktata kaj lastatempe aperis, kiel surprizo, oficiala gramatiko de la franca lingvo. Oni povis antaŭvidi, ke ne ĉiuj konsentos pri la akademiaj reguloj sed eĉ la plej kritikema franco ne antaŭvidis la uraganon de protesto kiu eksplodis tuj post la apero de la akademia gramatiko. Kritikaj libroj estis ĵetataj sur la libromerkaton kaj tiuj estis siavice kritikataj, *ad infinitum*. Unu el la plej spritaj kritikoj de l' kritikoj estas cetere verko de nia samideano, la profesoro Camille Aymonier, kies legon mi varme rekomendas al kiuj havas interenson pri franca lingvistiko.

En sia defendo de l' akademia gramatiko,* profesoro Aymonier uzas multajn interesajn argumentojn, kiuj estas nepre atentindaj flanke de l' esperantistoj: li eĉ citas la ekzemplon de l' internacia lingvo, kvankam li ne nomas ĝin per la vorto «esperanto».

Parto la plej interesa de l' verko de prof. Aymonier estas en kiu li kondamnas la «neologismemulojn» «reformemulojn» de la franca lingvo. Li citas la sekvajn vortojn de prof. Félix Bouillot, de la Universitato en Bristol:

«Plej ofte la bonaj metiistoj scias kontentiĝi pri la laboriloj kiujn ili heredis de l' tradicio. Ilia originaleco konsistas en la stilo kaj tute ne en la sintakso. Ĉi-rilate la obeemo do ĝenas ilin. *Lacordaire* diris: «Estas la libereco kiu subpremas, la leĝo liberigas».

Antaŭ nelonge profesoro Aymonier honoris nian revuon publikigante en ĝi tre valoran artikolon kontraŭ la malsano, kiu konsistas en *evito al «mal»*. Tre ĝojigas nin konstati, ke li laboras por la samaj kaj sanaj ideoj en la sfero de la franca lingvistiko kaj ni deziras al li, ke li ĝisvivu la plenan triumfon de siaj ideoj.

Dum la franca publiko tiel pasie interesiĝas pri la nacia lingvo, la esperantistoj malbele neglektas sian internacian lingvon. Estas plorinde, ke eĉ la redaktoroj de nia gazetaro malinteresiĝas pri la konkreta propono de nia ĉefredaktoro pri la *unueca uzo de l' esperantaj radikoj*. La kompatinda publiko estas perpleksa. La vortaroj konfliktas, sin kontraŭdiras, ili havas mankojn kaj neniom da aŭtoritateco oficiala.

Ĉar nia Esperantista Akademio estas eĉ pli maldiligenta ol la Franca Akademio, ĝis nun *nenion* ĝi plenumis. Mankas oficiala vortaro (se oni ne konsideras kiel tian la cetere neaĉeteblajn vortolistojn: tie ĉi mi proponas riĉan rekompencan al tiu kiu havigos al mi la ĝis nun aperintajn oficialajn vortradikojn, kondiĉe ke neniu vorto mankos). Mankas ankaŭ oficiala gramatiko, jam ne parolante pri retoriko kaj stilistiko.

Mi urĝe vokas al la Akademianoj de Esperantujo: majstroj, ek' al labor', vekigu maljunulojn dignoplenaj, dungu almenaŭ junajn helpantojn kaj laborigu ilin fariĝante iliaj direktantoj. Sed la esperantista popolo bezonas, postulas oficialajn vortaron, gramatikon, stilistikon, sen kiuj estas neniu lingva

* La Grammaire de l' Académie Française et ses Critiques, chez Firmin-Didot et Cie, Paris.

aŭtoritateco, neniu certeco en la tradukoj, neniu ŝanco, ke nia lingvo estos iam oficiale rekonata. Ĉar se la «lingvo vivas en la literaturo», la literaturo siavice postulas lingvon evoluintan. En la naciaj lingvoj la reguloj estas ĉerpataj el la lingvo mem. Tio estas procedo daŭranta jarcentojn, metodo arbitra, hazarda, malrapidega. Tempo estas kara por ni. Nia lingvo bezonas *virojn* pretajn al grandaj agoj, grandaj laboroj, seriozaj taskoj. La laboristoj bezonas laborilojn.

Lasi la laboron al privata iniciativo estas elturniĝo pura kaj simpla. La Akademio solvu siajn taskojn. Se ne, ĝi disiĝu aŭ... oni elektu pli taŭgajn akademianojn. Mi esperas, ke la nova organizo de nia Movado estos sufiĉe demokratia por permesi, ke la volo de l' esperantista popolo estu aŭdata. Kiam iu petos mian voĉdonon pri akademiano, mi unue demandos lin: ĉu vi estas preta laroni por la oficialaj vortaro, gramatiko, stilistiko? Jes aŭ ne. Se ne, la BALAILON!

La germana vidpunkto pri la rasproblemo

Al la

Oomoto Centra Oficejo

Kameoka (Kioto-hu)

Tre estimataj samideanoj.

Kun granda ĝojo ni ĉiam ricevas vian ŝatatan gazeton kaj per tio deziras esprimi al vi nian profundan dankon pro la regula transsendo...

En via ŝatata gazeto de la Maja numero vi publikigis artikolon pri Hitler kaj Japanujo, kiu montras tute malĝustan bildon pri la raso-pensoj en Germanujo. Pro tio ni sendas hodiaŭ al vi ĉi kune alian artikolon por kies publikigo nia Instituto estus tre danko al vi, ĉar ni esperas, ke per tio multaj miskomprenoj estos nuligataj.

Dezirante al via ideala laboro ĉiam pli kaj pli da sukceso, ni salutas vin.

Sincere kaj samideane

E. Wunderlich

Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko

Inter la multaj demandoj, kiuj hodiaŭ movas la mondon rilate al la nova Germanujo, staras en eminenta loko la okupiĝo je la germana vidpunkto pri la rasproblemo kaj je ties politikaj konsekvencoj. Ĉiam denove oni trovas en eksterlandaj gazetoj aŭ broŝuroj traktaĵojn, kiuj priparolas germanan vidpunkton pri la rasproblemo kaj kiuj plej ofte tute ne konas la

verajn faktojn aŭ — ankoraŭ pli ofte — miskonas intence la germanan raspolitikon kaj tiel pli multe malakcelas ol progresigas la komprenon de l' germana raso-leĝdono. Kaj ĉiam denove en interparoloj kun eksterlandanoj, kiuj konfide sekvis la opinion de sia gazetaro kaj sekve kun sincera zorgo rigardas la situacion de la mondo, oni renkontas la plej strangajn kaj plej malĝustajn ideojn.

Oni riproĉas la germanojn, ke ilin kaptis nesuperebla fifiero kaj rasa arogeco; ke kun malŝato ili rigardas la aliajn rasojn kaj popolojn; ke nur por sia propra popolo ili pretendas la rajton vivi; ke ili provas perforti la aliajn popolojn kaj forpreni ilian vivspacon. Oni parolas pri la danĝero, per kiu tiel Germanujo minacas la mondon — kaj oni tute ne scietas, ke per ĉiuj ĉi riproĉoj oni tute preterjuĝas la fundamentajn principojn de la germana rasvidpunkto; oni entute ne scietas, ke la ideoj kaj la praktiko de l' germana raspolitiko iras nepre alian vojon; ke nome en la nuna Germanujo la respekto al la propra raso kaj al la propra nacio pliakrigas la ekkonon de l' propra valoro de fremdaj rasoj kaj nacioj.

Kiel hodiaŭ en Germanujo oni vere rigardas la rasproblemon kaj kiel oni trak-

tas ĝin en la praktika politiko, tion mont-ru en la sekvantaj linioj kelkaj frazoj el traktaĵoj kaj paroladoj de kondukantaj viroj de l' nova Germanujo, nome de l' estro de la raspolitika oficejo de l' NSDAP (Nationalsozialistische Deutsche Arbeiter-Partei, Nacisocialista Germana Laborista Partio) de l' germana ministerio por internaj aferoj kaj fine de la *Führer*¹⁾ mem.

En sia traktaĵo «Rasideo kaj mondpolitiko»²⁾ skribas D-ro Gross, la estro de la raspolitika oficejo de la NSDAP:

«... La konsekvencoj de l' rasa vidpunkto de la nacia socialismo tute neniel kondukas al kondamno aŭ malŝato de iu ajn alia rasgrupo, sed nur al la objektiva konstato, ke la rasoj fakte estas interne kaj ekstere malsamaj. El tio sekvas nenio alia ol nura ekkono, ke ĉiu tia raso rajtas, pretendi por si en sia pura esteco la vivon en tiu ĉi mondo, sed ke aliflanke la malklarigo de la limoj inter ili kaj la aliaj rasaj grupoj estas la plej danĝera kaj plej grava peko kontraŭ la vivo kaj tial evitenda...»

Kaj ĉu la respekto al la propra valoro de la fremdaj, ankaŭ de la koloraj rasoj povas esti pli granda, ol tion esprimis la sekvanta parolado de D-ro Frick, la germana ministro por internaj aferoj, kiun li faris pri la raso-leĝdono de l' Tria Regno³⁾ la 15an de februaro 1934 kaj en kiu la konservo de l' raspureco de la gentoj ĉe ĉinoj kaj japanoj estas starigata kiel modelo por la germana prirasa zorgado:

«... La germana raso-leĝdono ne volas juĝi pri la boneco kaj la valoro de aliaj popoloj kaj de aliaj rasoj. Nia *Führer* mem diras tion en sia verko «Mein Kampf»⁴⁾: «Estas vane, disputi

pri tio, kiu raso aŭ kiuj rasoj estis la unuaj portantoj de la homa kulturo kaj pri tio la veraj iniciantoj de tio, kion ni entenas per la vorto: *homeco*». Sed ni germanoj inklinas al la opinio, ke ankaŭ aliaj fieraj popoloj havas la saman vidpunkton kaj principe rigardas grave tion, ke ilia rasa strukturo restu kiel eble plej malfalsigita kaj malmiksita. Rigardante ekz. la plejelektitajn malnovjapanajn kavalirgentojn, la nobelfierajn samurajojn, aŭ la kulton de l' prauloj ĉe la ĉinoj, ni trovas en tio modelojn por ni mem, kiuj bezonis specialan raso-leĝdonon, por esti ree memorigataj al siaj plej sanktaj bonoj...»

Kaj fine: Kie ŝtatisto de nia epoko postulis tiel klare la respekton al aliaj rasoj kaj popoloj — plej akre kondamnante ĉiun devigon kaj perfortan politikon — kiel bazon de l' paco, ol tion faris la kanceliero de l' Germana Regno, Adolf Hitler, en sia parolado okaze de l' datreveno de la nacia releviĝo, la 30an de januaro 1934:

«... La nacisocialista rasideo kaj ĝia fundamenta ekkono pri la rasoj ne kondukas al malpliŝato aŭ malplivalorigo de aliaj popoloj, sed kontraŭe al la ekkono de la tasko, taŭge konservi kaj progresigi la vivon de l' propra popolo. Tiel ĝi kondukas devige al la natura respekto al la vivo kaj esteco de aliaj popoloj. Per tio ĝi liberigas la eksterpolitikan agadon de tiuj pruvoj, subigi fremdajn homojn, por poste regi ilin kaj eĉ kiel nurajn nombrojn enkorpiigi ilin en la propran popolon per lingva devigo. Tiu nova ideo starigas la taskon, same forte kaj fanatike sinfordoni al la vivo kaj per tio al la honoro kaj la libereco de la propra popolo, kiel ankaŭ respekti la honoron kaj liberecon de aliaj. Tial tiu ideo povas esti pli bona bazo por la aspirado al vera pacigo de la mondo, ol tiu nur per la potenco planita kaj praktika diferencigo de l' nacioj laŭ venkintoj kaj venkitoj, laŭ rajthavantoj kaj senrajtaj subigitoj...»

1) T. S. kondukanto (alparola formulo al Adolf Hitler flanke de germanoj)

2) En la revuo «Ziel und Weg» (Celo kaj vojo) 17a kajero, la unuan de novembro 1933.

3) Germanujo sub nacisocialista reĝimo

4) V. S.: Mia batalo (tiu verko enhavas ĉiujn fundamentajn ideojn de Adolf Hitler)

Japana Filozofio^①

Michel Revon

(7)

La meidi-Epoko^②

La nova filozofio en Japanujo, konforme al la praktikemo de l' japanoj precipe okupiĝas pri sociaj problemoj. Same kiel la ŝtatviroj en Tokio, kiuj emas esti edukistoj antaŭ ĉio,^③ la filozofoj celas utilecan propagandon pere de instruado, gazetaro, eĉ politiko.

La plejparto de l' movad-estroj, en tiu ĉi lando de realigoj rapidaj kaj ankaŭ planitaj, estas homoj kompletaj, en kiuj inteligenteco kaj agemo mirinde harmonias. *Hukuzawa* reprezentas la anglan utilismon^④; *Katoo Hiroyuki*^⑤ la germanan materialismon: *Nakae Tyomin*^⑥ la spiriton de l' 18 jarcentaj francaj filozofoj:

Ĉiuj estis tamen samaj en unu punkto. Nome, ke la fremdaj ideoj estas de ili akceptataj nur post filtro tra ilia racio.

La Homo en la naturo de *Hukuzawa*

Iuj diras, ke la homo devas esti dankema ĉar li naskiĝis en tiu ĉi mondo, ĉar li vivas; sed tiu ĉi argumento estas absurda kaj neatentinda. Pensante pri la ceteraj vivantaĵoj, la homo diros, ke li estas feliĉa esti homo kaj ne iu bestaĉo; sed se oni konsideras tion feliĉo, kiu vivantaĵo estus malfeliĉa?

Al fiŝoj oni diros: «estu feliĉaj, ke vi ne estas insektoj»; al la birdoj: «vi estas bonŝancaj ne esti fiŝoj»; al katoj oni klarigos la mizeron de l' musoj; ĉe hundoj oni kompatos la malfortecon de katoj; kun simioj oni ridos pri la stulteco de leporoj; tiel, ke ne estos fino en tiaj distingoj inter feliĉo kaj malfeliĉo. Sed eĉ se oni restas ĉe homoj, oni diros al individuoj 30-jaraj: «vi ne havas ankoraŭ 40 jarojn, vi do estas feliĉaj ĉar vi vivos ankoraŭ longe»; ĉe 40-jarulo oni komparos lin al homo 50-jara; al 50-jarulo oni parolos pri 60-jarulo; al 60-jarulo pri 70-jarulo; kaj tiel plu ĝis 80, 90 jaroj, ĝis la morto; kaj ĉiu havante longan vivon antaŭ si, ĉiu estos feliĉa. Se ĉi ĉio ne estas absurda, kio estas tia!

Se ni pripensas kun trankvila koro kaj sen antaŭjuĝoj, ni komprenos, ke homoj estas homoj, same kiel fiŝoj estas fiŝoj, birdoj estas birdoj kaj 30-jaruloj estas 30-jaruloj. Necesas nek ĝoji, nek miri pri tio. La **Ĉiela Vojo**^⑦ taŭgas por la homo, ĉar ĝi kunordigas ĉiujn fenomenojn. La Ĉiela Vojo estas ĝuste la Ĉiela Vojo: la afero estas simpla. Se ĝi ne taŭgas por la homo, se ĝi ne kunordigus ĉion, nek la homo nek la multegaj aliaj estaĵoj ekzistus kiel ili ekzistas sur la tersurfaco: ja eĉ la terglobo ne ekzistus en sia nuna stato. Sekve, la ekzistado mem estas funkcio de la Ĉiela Vojo; sed oni ne povas diri pro tio, ke tiu lasta estas bona pro la ekzisto de la aĵoj. Trakti ĉion laŭ homa vidpunkto (t.e. bona aŭ malbona) estas ĝuste homa eco. Sed juĝo pri la tuta Kreado laŭ vidpunkto antropomorfisma pravas nekomprenon pri la grandeco de l' Universo.

Ĉar la Ĉiela Meĥanismo estas vastega kaj senpartia, ĉiu el la senfine multaj aĵoj estas en sia loko tiel ke la tuto estas nekunmezurebla kaj perfekta. Ni konsideru la grandajn korpojn, ekz. sunon, lunon, stelojn, niun teron kaj la malgrandajn, ekz. birdojn, mambestojn, herbojn, arbojn, insektojn: se

① Vidu ankaŭ O. I. aprilo, majo, junio, aŭgusto, oktobro k. nov. 1934

② Meidi (elparolu Meiĝi) estas la nomo de la granda Imperiestro kiu ordonis la modernigon de Japanujo.

③ ekz. grafo Ookuma (1833-1922) ministro, ĉefo de l' progresema partio, tute sin donis al la Universitato «Waseda» kiun li mem fondis.

④ (1835-1901) Edukisto laŭ usona stilo, utilecema, priensema, praktikega, fondinto de granda universitato («Keioo»), direktoro de granda ĵurnalo en Tokio («Zizi-Simpō»), aŭtoro de multaj libroj. Li estis ekzemplo de modesteco kaj eĉ malakceptis nobelecon proponitan de l' Imperiestro petante anstataŭ tion monon por la universitato de li fondita

⑤ (1836-1916.) Rektoro de l' Universitato de Tokio.

⑥ Studis en Francujo, tradukis la «Socian Kontrakton» de Rousseau.

⑦ Tiu ĉi esprimo pruntita de l' antikva, ĉina filozofio, perpleksigas tiun, kiu supozas, ke la aŭtoro estas «materialisto» en la eŭropa senco de la vorto (la Trad).

ĉiu el ili havas konscion kiel la homo, ĉiu el ili estus kontenta pri si mem. Ĉiu estus kontenta kaj ĉiu restus trankvila pri sia sorto. Ĉar la granda Maŝino de l' Universo ĉion enhavas senescepte, super kaj sub la suno, luno, steloj tiel ke eĉ eta polvo estas ĝia integra parto.



Diri, ke ni estas dankemaj ĉar ni estas ni mem estas do kvazaŭ ni dankus niajn organojn kaj muskolojn kiuj per sia ekzisto kaj kunlaborado konsistigas nian korpon. Se oni konsideras organojn kaj muskolojn unuope, oni perdas la korpon; se oni konsideras aparte la multegajn aĵojn, oni ne plu vidas Universon. Kiuj el la multegaj aĵoj estas esencaj kaj kiuj estas akcesoraj, jen estas problemo nesolvebla. Ĉiukaze, etaj atomoj kiaj ni estas, kontentaj pri ni mem, ni povas admiri la mirindaĵojn de la granda maŝino: la mondon de l' grandaj korpoj same kiel tiun de l' mikroskopaj estaĵoj por

kompreni kaj nian grandecon kaj nian malgrandecon; sed ni ne bezonas esti «dankemaj». Tamen, estante hom-idoj, t. e. civilizeblaj kaj progresemaj estaĵoj, ni memoru pri la pasinteco kaj estu dankemaj pri la bonfara heredaĵo ricevita de niaj prapatroj; al la estonto, al niaj posteuloj ni metu bazon por estontaj saĝeco kaj virto: Jen ĉio, kion ni devas deziri.⑧ Elfrancigis: Marko Polo

★

⑧ La ĉefa tezo de l' aŭtoro estas, ke oni ne devas esti dankema pro tio kio oni estas. Sed se oni estas dankema, nature kaj sen devigo, laŭ libera volo, tio estas ankaŭ... la Ĉiela Vojo, kaj laŭ Oomoto-instruo, kiuj ankoraŭ ne estas spontane dankemaj apartenas al malaltnivela kategorio de homoj, proksimaj al bestoj.

La aŭtoro estis antaŭe konsiderata kiel «moderna» kaj eĉ ateisma. Al nia generacio li aperas tamen kiel vulgariganto de filozofiaj ideoj, malnova skolano kaj metafizikisto. (La Trad.)



Krizantemo en plena florado

Defende al Nia Malatentata Fundamento

Joab Eliot', ano de la novmonda ne-militlohava regno,

La Preternacio Konstancia.

Oomotanoj, laŭdon al vi pro via lojala flegemo al la kara lingvo. Ĉu vi, do, permesus al mi, ke mi atentigu pri eĉ multe pli grava atenco kontraŭ ĝi, ol de la neologismemuloj? Tio temas pri la nuna malfundamenteco, kion mi deziras atentigi.

Nur kiel dece estas, komenciĝu la temo per elkore la saluto, «Vivu Zamenhofo, li kaj lia stelo!». Pli dolĉa resonu la adorado depro liaj senĉesaj laboregoj por «La Bena Sankta Celo». Kaj al lia genio ni danku pro ĝia fruktaĵo, la deksexregula fundamento en kiu sin bazas nia lingvo.

Ne solaj unu^① jam troviĝas la gramatikisto, la verkisto, la ĵurnalisto, kiuj preferas sekvi la tiel-nomitajn laŭ-Zamenhofaĵojn, allogajn florojn ĉeflanke Esperanton^②, anstataŭe ol antaŭen paŝi per la Fundamento, vojo el ŝtonoj daŭraj se malmolaj. Nu, mallonge mi pritraktu kelkajn ekzemplajn malfundamentaĵojn, ĉu aŭ ne oni povus trovi ilin laŭ-Zamenhofaj.

Jen Regulo I: «*LA*» estu artikolo difinita. Bedaŭrinde, oni sufiĉe ne instruas tion. Anstataŭe, oni instruas, ke *LA* estas *THE* (angle) aŭ *LE* (france) aŭ *ALIO*. Kial oni ne instruas: ke, kiel la pronomo *UNUVORTE* anstataŭas iun substantivon elmontreblan nur per nombro da vortoj, tiel la facila artikolo *LA* anstataŭas tutan demonstrativan pronomo-frazon, «*TIU(j)* (ĉi) io, nome»? Se oni komprenus tion, oni facile evitus tian sensencan zamenhofaĵon, kia ĉe la «*Ekzercaro*, § 10,» «*Antono estas la malplej saĝa EL ĉiuj SIAJ fratoj*». *ESPERANTIGITE*, tiu zamenhofaĵo devus skribiĝi, «*Antono estas la malplej saĝa el LA fratoj*». El *KIUJ* fratoj, do?

^① Malfundamentuloj dirus, «ne solaj unuj», kvankam unu ne estas deklinaciata, laŭ Regulo IV.

^② Aŭ, «ĉeflanke je Esperanto». Vidu Regulon XIV.

Kompreneble el «*TIUJ*, nome, el ĉiuj *LIAJ* fratoj *kaj LI*». *SIAJ*, supre citita, estas neebla vorto en tiu frazo.

Troviĝas inter esperantistoj terura malkonkordo pri la uzado de la akuzativa formo -*N*. Tamen la Fundamento estas treege klara pri tiu punkto rilate la prepozicion. Tiel;

(1) La prepozicio *POSTULAS* la nominativon.

(2) Por montri *DIREKTON* la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

(3) Anstataŭ la prepozicio *JE*, oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

Nu, vi Oomotanoj diras: kial oni peni eviti la duoblan *I* en *Alĉemiŝto*? Mi respondas per: kial oni peni eviti (*KROM JE*) la prepozicion?

Esperante, ĝuste estas «paŝon post paŝo», «*Je paŝo post paŝo*», «*Tempon al tempo*», «*Je tempo al tempo*». Kaj malĝuste estas ambaŭ «*Mi venos mardo*», «*Mi venos je mardon*». Kaj kial oni tiom emas diri, (*Kio ne estas Esperanto*), ke «ĝi kostas ĉirkaŭ tri ŝilingojn» (eĉ *Millidge*)? Ĉu oni ne dirus: «mi kuras ĉirkaŭ tri arboj»? Kial oni devas lerni distingi inter «*kosti ĉirkaŭ*» kaj «*kuri ĉirkaŭ*»? Kial elpensi lingvaj malfacilaĵojn por turmenti animsimplajn esperantistojn?

Zamenhofaĵo, *SED NE ESPERANTO*, estas frazo, kia «*De loko al loko*». *Esperantigite*, tiu zamenhofaĵo skribiĝus «*Lokon al loko*» aŭ «*Je loko al loko*», *SE* oni ne bongustumus la frazon «*El loko al loko*». (Kompreneble, kiu opinius ĝusta la frazon «*El loko al loko*» — *al ĉiu la rajto de lia gusto* — tiu nepre uzu tiun frazon prefere ol aŭ la *JE*-frazon aŭ la akuzativon. Kaj kial oni *NE* povas diri esperante «*DE loko al loko*»? Ĉar Esperanto *jam estas rezervinta*

2

mento, ho VERDA MONDO, do «petro ricevas la leteron de la poŝtisto» NE ESTAS, ke «petro ricevas la leteron pere de, done de, el la mano de, (ktp) la poŝtistoj: sed NUR, ke li ricevas (kaj ne montriĝas kiel) la leteron, «apartenantan al la poŝtisto».

Sufiĉe. Mi finiĝu, petegante, ke ni re-venu al la Fundamento de Esperanto, anstataŭe ol perdiĝi inter la eĉ plej belaj da nuraj laŭ-Zamenhofaĵoj.

Vivu LA LINGVO! Kaj ni ĉiuj per ĝi antaŭen inter ĉiam pli kaj pli da elkom-prenata ĉielo (revelacio) ĝis DIO, la nea-tingebla «Sankta Celo».

③ Johano ricevis la leteron de Petro al Patriko pri Tomaso elde Paŭlo.

1

la prepozicion DE por esprimi la genitivon ĉe la substantivo (vidu Regulon II), kaj la kvazaŭ-genitivon ĉe la verba pasivo (vidu Regulon VI). Ne povas taŭgi, ke oni uzu la genitivon prepozicion por esprimi la ablativon. Pri tio ĉio mi rimarkis eraron en la aŭgusta «VERDA MONDO». Sub bildo sin trovis la frazo «petro ricevas pomon de la patro». Tamen, la bildo neniel montris, ke Petro ricevas ties pomon; sed la bildo nur montras, ke li ricevas iun pomon DONE de la patro, ke li ricevas iun pomon, donacon de la patro. DONE DE estas adverba kvazaŭ-genitivo. (Oni povus anstataŭigi «DONE DE» per rekta prepozicio, kia Dónde, ELDE aŭ iu alia^③). La lingvo Esperanto fariĝas tre libera al ĉiuj. *Oni nur atentu la Fundamenton.* Ĉar jen la funda-

PRI LA PRONOMOJ EN ESPERANTO

Ismael Gomes Braga (Brazilo).

D-ro. Zamenhof ie rakontis, ke en la komenco de nia movado ĉiu persono, kiu aprobis Esperanton, proponis tuj unu aŭ kelkajn ŝanĝojn en la lingvo por ke ĝi estus perfekta kaj lerninda. Tio estas memkomprenebla, ĉar kiam ni eklernas unu lingvon, multaj formoj al ni ne plaĉas, kaj ni volonte ilin *korektus* por ilin adaptigi al niaj gustoj kaj kutimoj. Pri lingvo natura oni scias ke ŝanĝoj ne estus eblaj, kaj iom post iom alkiutimiĝas aŭ forlasas la lernadon, sed pri artefarita lingvo la lernantoj sin juĝis kompetentaj por ĉiuspeca korektado.

Pri tiu korektemo ni jam havas bonegan provon en diversaj projektoj, kaj neniu el ni plu kuraĝas eĉ tuŝi tiun temon.

Esperanto estas majstroverko netuŝebla, sed la ŝanĝproponintoj ne estis povintaj tion kompreni. Al mi ankaŭ io en nia lingvo ŝajnis korektinda. Mi ne proponis korekton, sed ĉiam esperis, ke venos tempo,

kiam Esperanto estos sufiĉe forta por ke oni ne timu ĝian mortigon, kaj per unu fojo farus ĉiujn necesajn korektojn. Mi dum pli ol dudek jaroj atendis tiun oportunecon por prezenti mian korektproponon. Nur la trastudado de multaj aliaj projektoj fine klarigis al mi la eraregon, kiun mi estus faronta, kaj nun mi hontas, ke dum tiel longa tempo mi ne estis eltrovinta mem la kialon, kaj mi ruĝiĝas pri mia ridinda ideo korekti verkon de geniulo, kvankam mi mem estas simplulo.

Eble aliaj simpluloj, same kiel mi, ankorau ne eltrovis la kialon, tial mi verkas por ili tiun ĉi artikoleon.

La pronomoj *mi, ci, li, ni, vi*, kvankam tre oportunaj por la formado de l' posesivoj, akuzativo kaj por la uzado kun prepozicio, ŝajnis al mi netolereblaj kiel subjekto. Mi dezirus, do, ke la senescepteco de nia gramatiko rompús sian principon, kaj por

Mi konfesas, ke mi ne eltrovis tion per

mi mem. Nur aliaj personoj, al kiuj mi montris frazojn tre similajn al alia nacia lingvo, kun tiuj pronomoj, eldiris tuj sian malaprobobon: «tiu frazo estas kriplaĵo! tio estas gramatika eraro! tio estas parolo de negro! tio tute ne povas esti korekta!»

Post tiuj komentarioj, mi ekkomprenis gravan lingvistikan problemon, kiun certe multaj aliaj jam estis komprenintaj antaŭe, nome ke oni ne lernas lingvon tro similan al sia nacilingvo, ekzemple: hispanoj ne lernas la portugalan, ni ne lernas la hispanan, ĉar ni neniam pensas pri tiu lingvo kiel fremda, sed nur kiel kripligo de la nia, malkorektaĵo. Ankaŭ ĉeĥoj kaj slovakoj ne lernas la lingvon unu de l' alia. Tio estas tre rimarkinda fenomeno. Oni neniam sukcesis enkonduki en la brazilajn lernejojn la hispanan lingvon, kvankam diversaj aliaj lingvoj estas oficiale instruataj. la subjekto oni havus aliajn pronomformojn, ekzemple: *vo, tu, il, noi, vu*. Tiam mi opiniis, ke tiu malgranda ŝanĝo estus la savo kaj feliĉo de Esperanto; sed nun, post atenta lernado de unu mondlingva projekto en kiu mi trovis tiujn pronomformojn, mi estas plene konvinkita, ke tiuj kvin unu-

silabuloj sufiĉus por mortigi nian lingvon.

Tiuj kvin pronomoj estas uzataj je ĉiu momento en la latinidaj lingvoj, kaj ĉiu el ili postulas specialan personan finiĝon por la verbo, en niaj nacilingvoj, pro centjara kutimo. Sen tiuj finiĝoj, la frazo ŝajnas abomeninda kriplaĵo, nepra eraro. Ekzemple: Por hispanlingvano la formoj: *yo amas, yo amis*, ŝajnus nepra gramatika eraro netolerebla. Por italo: *tu amas, noi amas*, nepre malplaĉas pro la nacia kutimo kun tiuj pronomformoj devige kunigitaj kun aliaj verbformoj, kaj simile por franc- kaj portugallingvano.

Mi ekkomprenas nun kial la mondlingvaj projektoj tre naturaj, tre belaj, sed tro similaj al la naturaj lingvoj, restas ĉiam en rondo de poliglotoj, sed neniam disvastiĝas kiel Volapük aŭ Esperanto. Eĉ la troa artefariteco de Volapük estus preferinda, laŭ la propaganda vidpunkto, al la troa natureco. Kaj tiuj kvin pronomoj sufiĉus por igi Esperanton tro similan al niaj nacilingvoj. Do nun mi respekteme mallevas la kapon antaŭ la genia aŭtoro de Esperanto, kaj diras humile: Vi ĉiam estis prava, eĉ kiam mi ne komprenis vin!



— Ombrel-metiisto —

Izu-spirito en vilaĝo

Originala Novelo de Jamato Masaharu

Pene kaj dolore marŝis la funebra taĉmanto da mizeraj homoj, viktimoj de l' homa krueleco. De ĉiuj flankoj oni superŝutis ilin de insultoj kaj ŝtonoj. Estis grupo de dudeko da homoj: viroj, virinoj, infanoj. Kelkaj portis fantaziajn vestaĵojn — kvazaŭ ŝiprompuloj kiuj rapidege surmetis ion ajn por protekti kaj ŝirmi sin kontraŭ malvarmo kaj honto; aliaj estis preskaŭ nudaj; unu dika, ŝajne graveda virino estis eĉ tute nuda. Kelkaj el la malfeliĉuloj havis vundojn el kiuj fluis sango kaj ili klopodis ilin bindi kaj bandaĝi per ĉifonoj. Malmultaj el ili ploris — ili estis tro terurigitaj por eĉ plendi. Ĉar oni pelis ilin kiel brutojn al buĉejo.

Fine ili alvenis, mizeraj posteuloj de tiu alia judo kiu mortis sur Golgoto. Knaris vipoj, sonis sovaĝaj komandoj kaj ĉiuj ekfosis... la propran tombon komunan.

Kiel la leganto jam divenas temas tie ĉi pri unu el tiuj hontindaj scenoj kiuj por eterne makulas la paĝojn de l' kulturhistorio: vilaĝanoj ekscititaj de lerta, politika propagando «ekstermis judaĉojn,» rabis kaj bruligis iliajn domojn, malhonorigis la virinojn kaj ne indulgis eĉ suĉinfanojn.

La katolika pastro vidis la diablecan procesion tra la fenestro. Kvankam li mem estis konata antisemito, momente li konsterniĝis je la vido de l' kolektiva frenezo. Li ekhavis ideon, ke lia prestiĝo eble pligrandiĝus se li kontraŭstarus la taĉmenton de l' ekzekutistoj, haltigus ilin en la nomo de l' Virgulino kaj vokus al la viktimoj, ke ili konvertiĝu. Sed li tuj forpelis tiun penson. En la dudeka jarcento ne plu estas loko por tia «mezepokeca interveno»; oni cetere ne aŭskultus lin ĉar li mem estis el la plej entuziasmaj agitantoj kontraŭ la «idoj de tiuj kiuj mortigis la Savanton», kiel li elokvente estis espriminta sin en pli ol unu dimanĉaj predikoj.

Nenio kaj neniu malhelpis do la marŝon de l' judoj al la tombejo kie ili fosis sian tombon laŭte preĝante per misteraj, hebreaj vortoj, kies sencon ilia raso jam forgesis tra la jarcentoj sed kies spirito estas tiel forta, ke ĝi — almenaŭ en certaj cirkonstancoj — determinas rektan intervenon de Dio.

Mi ne priskribos la naŭzajn scenojn de l' abomena kaj malinda turmentado. Ŝajnis, ke dudeko da homoj mortos en tiu ĉi tombejo, kiel tiom da aliaj jam mortis en militoj kaj pogromoj. Unu el la gvidantoj de l' ekzekuto, drinkema apotekisto, stariĝis sur bier-barelo kaj per plengorga voĉo, periode aplaŭdegota de l' amaso, li oratoris pri la pureco de l' nacia raso, pri la dezirindeco ekstermi la «orientan» elementon el ĝi. Je tiuj vortoj la plej laŭtaj aplaŭdantoj estis la ciganoj kiuj, kiel hienoj, orgie ĝuis la turmentadon al siaj propraj fratoj, la judoj de l' vilaĝo. La apotekiston sekvis aliaj oratoroj: kuracisto, notario, instruisto kaj, hontego, eĉ pastoro de protestanta sekto, pruvantaj, ke ĉiuj malbonoj estas kaŭzataj de judoj: milito kaj paco; kareco de manĝaĵoj en la urbo kaj malkareco de manĝaĵoj en la vilaĝo; judoj akaparas la kapitalon de l' mondo; ili estas pli studemaj ol kristanoj kaj forprenas ĉiujn bonajn postenojn; ili eĉ mortigas kristanan knabineon ĉiujare kaj manĝas ŝian sango: miksitane en macon, ktp., ktp.

Dum tiuj vortoj la tremantaj judoj estis malhome turmentataj eĉ de knabaĉoj, en la fosejo ebruloj gravedigis la vidvinon de l' rabeno; tiu lasta mortis en milito, defendante la landon de sia naskiĝo kiun li naive nomis sia patrujo.

La leganto jam bone konas tiajn scenojn kaj eble senpacience demandas al si, kial mi denove priskribas ilin. Tiaj okazaĵoj estis tro ĉiutagaj en la postmilitaj jaroj, en diversaj landoj de meza kaj orienta Eŭropo

por servi kiel objekto de novelo. Cetere mia verkista kapablo estas multe tro meza por ke mi sukcesu tiri el tia ŝablona temo valoran verkaĵon. Se mi do entute priskribas la okazaĵon, tio estas pro kaŝita motivo. Kaj kia motivo!

★

Por ke oni bone komprenu la okazaĵojn kiuj sekvas, mi devas tamen tuŝi ŝajne tute senrilatan temon: tiun de l' kompara religienco kaj la evoluo de l' modernaj religioj en la Oriento.

Laŭ la doktrino de iu japana sekto, kies nomo estas Oomoto, aŭ «Granda Bazo de l' Universo», la justa Dio de l' mondo estis detronigita en la antikveco de l' ĉiela Historio kaj Satano ekregis. La supra sceno koincidis ĝuste kun tiu grandioza momento de l' inter-spiritaj bataloj, en kiu la vera Dio finfine venkis Satanon kaj denove okupis la Tronon de l' Universo. En la sama momento la Dia Koro ekremis pro la turmento al la malfeliĉuloj kaj prokrastante la kreon de kelkaj novaj sunsistemoj en foraj regionoj de l' stela spaco, la justa Dio alprenis la formon de Izu-spirito (la sama, kiu fondis la jam menciitan religion de Japanujo), Dio malsuprenflugis sur la kotan sateliton de l' Suno kiun ĝiaj loĝantoj nomas Tero.

★

Dudeko da homoj preĝis kaj ploregis ĉirkaŭ ĵus fosita tombeĝo. Oni ĵus enmagnigis revolveron al maljuna judo, ordonante al li, ke li pafu la propran nepon aŭ se ne... mia plumo rifuzas surpaperigi la la teruran minacon, kiun la maljunulo certe ne dubis esti vera ĉar la afero jam okazis al lia filo ĵus antaŭe. Kvankam la afero eble ne rilatas rekte al tiu ĉi historio, mi devas menci, ĉar ĉiu elemento estas valora por la kompreno de tiu ĉi eksterordinara okazaĵo, ke laŭ genealogiaj esploroj poste faritaj, la knabo mortigota apartenis al la tribo de Levidoj, tiu parto de Izraelo

kiu en rekta linio originas de Abrahamo.

Ĉu la maljunulo estis pafonta, mi ne scias sed kredeble jes ĉar la alternativo estis eĉ pli malbona por la knabeto. La okjara knabo—ordinara, simpla infano—kvazaŭ eksentis, ke tragedio estas okazonta kaj el lia gorgo spasme eliĝis la hebrea «vortanimo»: «*Sema — Jisroel — Adonaiela — henu — Adonaï — Eĥod*».

En tiu sama momento okazis la «kolektiva frenezo» kiel diras iuj ĵurnalistoj. En tiu momento fondiĝis la nova religio kiu havas jam tiel multajn anojn tra la Okcidento kaj kies pastroj estas iamaj mortigistoj... En tiu momento, kiu scias, eble vere Dio aperis sur la tero.

★

La malfacilaĵo ĉe la prezento de l' okazaĵoj, estas tamen, ke ekzistas tri malsamaj rakontoj pri la okazaĵo... kaj unu fotografaĵo kiu kontraŭdiras ĉiujn tri raportojn.

La judoj pretendas, ke subite aperis Mozeo kaj ŝirmante la knabeton per la maldekstra brako, li benis la murdistojn per la dekstra.

La «kristanoj» certigas, ke Jesuo aperis en la mezo de l' tombeĝo, dirante: «*Enterigu min en tiu ĉi tombo anstataŭ mia popolo, ĉar mi diras al vi en vereco, por la dua fojo vi min mortigis, por eterne.*»

Sur tiu loko staras nun Katedralo de Katolikismo kie ankaŭ judoj preĝas, kvankam nur izole ĉar la rabenoj ne rekonas la verecon eĉ de l' Mozea apero, jam ne parolante pri Jesuo. La papo, pli moderna ol la judoj, preferas eluzi la «miton» por la refirmigo de la ŝanceliĝanta, oficiala eklezio tial li permesis la konstruon de l' «Katedralo de l' Sankta Apero».

La tria rakonto estas tiu de studento, kiu el sia fenestro eĉ fotografis la scenon. Li certigas, ke estis nenia apero. Subite la homoj ĵetis sin surteren kvazaŭ frapegitaj de fulmo. La buĉintoj frapis la frunton sur tomboŝtonojn (nun ili flegas leprulojn,

zorgas pri malsanaj judoj aŭ predikas al malriĉuloj pri Dio), la judoj ride-plore jubilis kaj preĝis samtempe kaj falis en la brakojn unu de l' aliaj.

La studento nekompreninte la kialon de la tumulto... fotografis ĝin. Envere li faris pli ol kvindek fotografajojn pri la turmentoj. Li estis nun el tiuj kiuj ne bezonas religion ĉar ili estas sanktuloj laŭ sia naturo: ili vivas bone kaj juste. Li volis konservi nerefuteblajn dokumentojn pri la barbaraj scenoj por poste kontraŭ-batali antisemitismon en la gazetaro. Kiam oni rivelis la filmon (kun kia zorgo, oni certe divenas!) vidiĝis super la malplena tombo, kvazaŭ ŝvebanta, granda figuro de maljunulino dignoplana, kun neĝblanka hararo kaj

aŭreolo ĉirkaŭ la kapo. Laŭ japanoj kiu konas la figuron de sinjorino Nao Deguĉi, fondintino de la jam menciita Oomoto, la fenomeno ĵus pritraktita estas *apero de Izu-spirito en vilaĝo*.

Kiu estas prava? La judoj, la «kristanoj», la fotografa aparato aŭ la studento? Ĝis nun oni pasie diskutas pri la afero kaj kredeble oni longe diskutos ankoraŭ. Mia persona opinio estas, ke ĉiuj kvar vizioj estas egale veraj por la koncernaj viziuloj. La itala dramverkisto *Pirandello* prave diris: «ĉiu havas sian propran veron». Nur unu afero estas certa: post tiu ĉi *Dia interveno* neniu pli kuraĝos turmenti judon kaj fine tiu multon-suferinta raso akiris pacon kaj trankvilon.

LITERATURA KRITIKO

Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo.

de Joseph R. SCHERER, speciala delegito de I. C. K., Enkonduko de Robert KREUZ, direktoro de I. C. K., kun 107 bildoj kaj 2 geografiaj skizoj, 272 paĝoj, kartone bindita, eldono de HEROLDO, 1933.

«Longan kaj sukcesan vivon al mia malnova amiko Jozefo MAJOR kaj gloran venkon al Oomoto deziras Joseph R. SCHERER» — jen estas la dediĉo propramane skribita de l' aŭtoro sur la internan kovrilon de la verko recenzota. Malnovan ŝuldon mi forpagas farante la nunan laboron. Sed la prokrasto estas intenca. Mi volis atendi ĝis kiam la aliaj kritikistoj estos dirintaj siajn vortojn kaj esperas revigli la interesiĝon de l' publiko per mia malfrua voĉo. Ĉar la verko de SCHERER decide meritas varman aplaŭdon. Ĝi estas la unua kvazaŭ profesia vojaĝlibro en nia literaturo. Mi volas diri, ke ĝi ne estas amatora, infaneca

bildlibro sed interesa, vivoplana, kvazaŭ

Mi aŭdas la cinikajn rimarkojn de K. R. C. S.: nu, oni vidas, ke Major kaj SCHERER estas amikoj, iamaj kunloĝantoj en Parizo. Ne tro frue ridu, fraŭlino, ĉar amiko aŭ ne-amiko, mi kritikis objektivite, kiel vi vidos tuj.

Antaŭ ĉio mi devas tamen refuti ĝeneralan kritikon de japanaj esperantistoj pri la libro. Eble tio estos surprizo por la aŭtoro, sed estas fakto, ke oni dise murmuris en Japanujo, ke la SCHERER-libro estas «supraĵa». Mi kredas, ke la murmurantoj *mem* estas *supraĵaj*. Antaŭ ĉio oni devas rimarkigi, ke la libro komenciĝas kun longa ĉapitro pri Japanujo, ĉapitro kiu estas 1/4 kinematografia vojaĝrakonto, en pura, bônstila, eĉ ĉarma esperanto. Apartan laŭdon meritas la fotografa talento de l' aŭtoro, kiu sendube posedas neoftan gradon da ĵurnalista instinkto. Li ankaŭ estas tre metoda, fero-nerva, entreprenema, laborema. . . En unu frazo: li ideale kunigas la bo-

najn kvalitojn de usonanoj, svisoj kaj esperantistoj.

de la tuta verko. En vojaĝrakonto pri la tuta mondo $\frac{1}{4}$ por Japanujo estas nomebla «leona parto», precipe kiam ĝi okupas la unuan parton. La kvanto sufiĉas do. Ĉu do la kvalito ne estas sufiĉe *profunda*? Mi ne kredas. Al mi ŝajnas, ke SCHERER estas eĉ tre subtila, en kelkaj lokoj. Li havas telenton por «resumi la situacion» kaj . . . foriri. Cetere mi ne kredas, ke vere «profunda» verko estus populara inter la esperantistoj, precipe en Japanujo. Kiom da japanaj samideanoj konsentas kritiki la «Vojaĝlibron de Filozofa», kies prijapanan parton Oomoto Internacia estas publikiganta? Al ili niaj kolonoj estu je l' dispono.

Kelkaj malatentoj tamen okazis eĉ al la tiel metoda SCHERER. Sur paĝo 2, tuj je la komenco, li skribas, ke li *dancis* kun filmsteloj kaj la . . . direktoro (ne tro ĝoju K. R. C. S., estas lingva erareto, ne fakto — ne venu do al Japanujo provizore, mi petas). Aliaj lingvaj eraretoj estas *sufloro* anst. *sufloristo* (en teatro) sur p. 19, la esprimo «sin memmortigi», kiu estas peniga pleonasmo, *Fujijamo* kiu devus esti *la monto Huzi, Fuji-monto, Huzi-San*, ĉio sed nur ne la sensenca kaj por japano ridinda «Fuji-yama». Kelkaj transskriboj de japanaj esprimoj estas eraraj, aliaj estas erare tradukitaj; ĝuste ĉe libro verkita en kunlaboro de esperantistoj tio devus esti evitata. Sed mi scias, ke SCHERER konsciencie klopodis korektigi la verkon antaŭ presigo. Li eĉ dissendis cirkulerojn al ĉiuj landoj petante kritikojn, korektojn. Se la japanaj esperantistoj ne sendis la petitajn korektojn, ili ne havas moralan rajton al kritiko post la apero de la verko.

La eldiroj de SCHERER estas kelkloke eĉ tro belaj pri aferoj japanaj. Pri la vagonaroj li havas ekzemple la opinion, ke ili havas «ĉiujn komfortojn», la manĝvagonoj estas ekipitaj «kun mirinda lukso» kaj

funkcias «kun preskaŭ nekredebla akurateco». Nu, mi amas la verecon kaj ne timas deklari, ke la *lasta* aserto estas tute prava.

Ĉar mi estas daŭra loĝanto en Japanujo, por mi kelkaj impresoj de okaza vizitanto, kia estas SCHERER post ĉio, estas . . . tiklaj. Ekzemple kiam li plendas, ke oni donis al li *sukiyaki* en ĉiuj urboj, ĉar oni rimarkis, ke li ŝatas ĝuste tiun specon de bovaĵo. Nu kara amiko Jozefo — aŭ pli ĝuste Joseph — mi sufloras al vi, ke vi nenion mankis, ĉar *la sola* japana manĝaĵo ĝenerale ŝatata de fremduloj estas ĝuste tio, kion vi ricevis.

Tokonoma estas la plej honora parto de japana, eleganta ĉambro kaj ĝi estas malfacile tradukebla en fremdajn lingvojn. Neniu nacia lingvo sukcesas traduki ĝin cetere. Nia internacia lingvo estas tamen pli entreprenema kaj SCHERER nomas «tokonoma» *alkovo*. Mia propra traduko estas «dekoracia niĉo». Kion diras la japanaj intelektuloj?

SCHERER ĵetis malvarman akvon sur la ŝultrojn por ne malvarmumi. Jen estas nova materialo, por piko, sinjoroj la Piratoj. Sed la humoraĵo konsistas en tio, ke SCHERER aldonas klaŭzon limigan: japanoj ne faras tion. De kie li scias tion, ke japanoj *ne* faras tion? Pruvi negativajon estas ja logika neeblaĵo. Se SCHERER vizitus publikan banejon, li tie povus vidi, ja eĉ fotografi unu el la gravmienaj sinjoroj, kiuj freneze ĵetadas pelvojn da malvarmega akvo sur la kapon, ŝprucante, grimacante, sternante, konvulsiante. Estus grandioza spektaklo kaj SCHERER certe skribus, ke «neniu eŭropano povus travivi tiun gimnastikon» anstataŭ deklari, ke neniu japano povus travivi la simpletan malvarman duŝon de l' aŭtoro.

Sufiĉas tamen la «erar-serĉado». La valorajoj de la libro grandskale superas la mankojn. Ni vidu nun, kiel SCHERER skribas pri sia vizito al Oomoto Teritorio, Kameŝoka,

«Vojaĝo al Kameoka, gvidata de s-ro Ito, la redaktoro de «Verda Mondo», kaj de s-ro Nišimura (ne Koogecu sed Jasuo Nišimura, juna samideano, nun en Manĉukuo). Survoje ni haltis en Araŝijama, ekskursejo famekonata kaj multe vizitata en la printempo pro la amase kreskantaj ĉerizfloroj kaj aŭtune pro la brilaj ruĝaj koloroj de la foliaro. Poste ili kondukis min al Kameoka, la propaganda Centro de Oomoto-movado. Oomoto instruas unuecon kaj harmonion inter la diversaj homaj rasoj kaj progresemon en sociaj plibonigoj. En la Aŭtunluna Ĉambro, unu el la multaj konstruaĵoj sur kruta monteto min salutis la Mastro Onisabro Deguĉi, kiu antaŭ kelkaj jaroj ordonis al la kredantoj lerni Esperanton. Kaj multaj nun parolas ĝin, kvazaŭ ĝi estus ilia gepatra lingvo. Post parolado en la Urba Halo kaj post mallonga dormo kun s-ro Ito, mi envagoniĝis je la 5-a matene por reveturi al Kioto. Vojaĝis en la sama vagonaro s-ro Onisabro Deguĉi, kiu montris sin kiel tre multscia kaj samtempe tre bonhumora gvidanto de la Oomoto-movado.»

La kritikontoj de mia kritiko eble riproĉos al mi, ke mi nur traktis pri la prijapana parto de la *scherera* verko. Ili tamen sciu, ke mi faras tion en la certa konvinko, ke ili *mem* alprenos la taskon kaj kompletigos mian kritikon kun kompetentaj rimarkoj pri la partoj de la verko, kiuj temas pri ilia propra lando aŭ la lando kiun ili elektis kiel propran, laŭ la libera volo.

J. Major.

★ Stellan Engholm: *INFANOJ EN TORRENTO*. Skizo. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Formato 20x13. 5 cm. 116 paĝoj. Prezo broŝurita 2.sv.fr., bindita 3.20 sv. fr. plus 10% por sendkostoj. Por AELA-anoj nur 0.80 sv.fr. kaj bind. 1.70 sv.fr. plus sendkostoj. La sesa libro de AELA 1934.

La nomo de Stellan Engholm estas famekonata de la tutmonda esperantistaro. Lia talenta stilo neniam enuigas la leganton, kvankam la enhavo mem ne estas tiel seri-

oza kaj ofte eĉ banala. Taŭge! oni nomis la libron «skizo» anstataŭ «romano». Kvar geknaboj, precize du paroj, kies vivado de l' infaneco ĝis la maturiĝo talente montriĝas sur la komencaj paĝoj, kvazaŭ oni legus «Fabeloj de Andersen». Laŭ vidpunkto de la enhavo ĝi ankaŭ estas skizo, sed certe originala, ĉarma kaj bonstila, tiel ke oni povas kuraĝe rekomendi ĝin al ĉiuj samideanoj. Ĝuste taŭga libro por la mezgradaj esp-istoj, kiuj konfuziĝas pri la elekto de libroj por sia progreso en Esperanto. La verko ne enhavas ŝokajn neologismojn kaj nur 114 paĝoj neniom lacigas.

Neologismoj proponitaj de la verkisto mem, estas nur kvar en tiu ĉi libro; inter ili *sledo* kaj *supertuto*, al mi persone akceptindaj. *Supuro* estas tamen stranga neologismo anstataŭ postsigno. Toleremaj kaj prudentaj E-verkistoj, kiuj koncernas al L. M. aŭ AELA denove ne ripetu aĉan uzon de tiaj neologismoj.

Preseraroj: p. 100 «en tiu momente» davas esti «en tiu momento». Kompare al la preseraroj gramatikaj eraroj estas pli gravaj, ĉar ili tuj influas la leganton kaj eĉ novajn verkistojn. Sur p. 14 *tiq'o* estas diskutinda, ĉar *ti-* ne estas radiko, sed korelativo, kiu ne povas dividiĝi en radikon kaj finajon; tute simila okazaĵo ankaŭ trovebla sur p. 89: *nenifaro*, Sur p. 88 kaj ankaŭ sur p. 102 «kelkiam»?! La verkisto atente pripensu antaŭ ol kunmeti vortojn, ĉu la gramatiko permesas tion.

Malgraŭ la supraj kritikoj la verkvaloro de Stellan Engholm neniom difektiĝas, kaj ni atendas pli dikan libron verkotan de li!!

T. Kamimura

★ *Lingva Kvaronhoro*, de Paul Nylen. Eld. de Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. 46 p. Prezo: 1 Sveda krono.

Lingvaj problemoj traktitaj kaj klarigitaj de l' aŭtoro, malnova kaj fervora samideano. La libro estas utila ne nur por studentoj de la lingvo sed precipe por la kursgvidantoj kiuj bezonas helpilon por klarigo de certaj detaloj kaj sekve bonajn ekzemplojn.

★ **Per kio ni amuzu nin?** de J. Rosenberg kaj E. Malmgren. 37p. Eld. kaj prezo estas same kiel supre. N-ro 4 el la serio de praktikaj manlibroj eldonata de Sveda Esp.-Federacio.

Ni ne estu ĉiam gravmienuloj; post serioza laboro, ĝojo kaj gajo regu en esp-istaj kunvenoj. Kaj ne nur komunan kantadon, sed oni povas aranĝi ankaŭ diversajn amuzojn. Jes por tio la libro estas bona helpilo, kiu enhavas 24 endomajn kaj 7 liber-aerajn ludojn kaj pli ol 20 danckantojn esperantigitajn el sveda originalo. Preso bela.

J. Hide

★ **Lexicon.** Kartludo. Eldonis John Waddington Ltd., Leeds kaj London. Speciala Eldono por Esperanto. Prezo: 2s. 6 p. afranko 2 p., ĉe Brita Esperantista Asocio, 214 High Holborn, London, W.C.I., Anglujo, aŭ ĝiaj agentoj.

Tiu ĉi nova ludilo «Lexicon» konsistas el 52 kartoj bonkvalitaj kaj pakitaj en eleganta libroforma ujo. Ĉiu karto surhavas literon de la Esperanta alfabeto kaj valorciferon. Kombinante kartojn, ludantoj formas esperantajn vortojn laŭplaĉe. Aldonita regularo bone klarigas la ludmanieron. La ludo estas amuza, interesa kaj samtempe instrua; do rekomendinda al esperantistaj familioj, kursoj kaj grupoj.

J. Hide

★ **La Kirgizoj,** de P. A. Smirnov. El la rusa tradukis Bazilo Averin. 20 paĝoj. Prezo: 0.30 sv.fr. Eld. Amerika Esp.-Instituto. 556 State St., Madison, Wis., Usono.

Ĉar ĝis nun pure etnografia priskribo estas preskaŭ netuŝita de esp.-literaturo, tiu ĉi verketo pri siberia nomada popolo «kirgizoj» estas despli bonvena por pliriĉigian literaturon.

Pri la geografio, socia organizo, vestaĵoj, manĝaĵoj, loĝejoj, laboro, religio, geedziĝaj kaj enterigaj kutimoj — entute oni havas koncizan bildon post tralego. Tre interesa enhavo, facile komprenebla stilo kaj, ve! multegaj preseraroj — karakterizas la libreton. Krom indikitaj 11 preseraroj, anko-

raŭ troviĝas pli ol 20. Kelkloke nenormala vortordo ankaŭ ĝenas la legadon. Estas bone ke oni speciale klarigas kelkajn etnografiajn vortojn en ĝi uzitajn sur la lasta paĝo. La presado estas nebela, kelkaj literoj ŝajnas malpuraj kaj difektitaj, multaj «komoj» similas «punktojn»...

Tamen tiajn difektojn plene rekompencas la enhavo interesa kaj ni varme rekomendas ĝin al ĉiuj.

H. Jama.

★ «*Ĉu vi audis tion?*» de S. Grenkamp Kornfeld. 46 paĝoj, prezo fl.-60 kaj 10% por sendkostoj, ĉe Esp. Instituto, poŝtfako 81, Venlo (Nederlando).

Tiu ĉi estas kolekto da anekdotoj, tradukitaj kaj ofte aplikitaj al esperantisma atmosfero. La humoro ne estas tre delikata, nek sprita. La tuta libro estas iom vulgara kaj haladzas odoron de fromaĝo, haringo, ajlo. La kompilinto restadas jam de longaj jaroj en Francujo kaj oni sin demandas, ĉu la franca «sprito» havas nenian influon sur lin.


El lingva vidpunkto la libro estas tute malaltnivela. Se la Lingva Komitato havus domon, mi konsilus al ĝi malhisi la standardon je duonmasto kiel signo de funebro okaze de tiu ĉi lasta libro de unu el ĝiaj anoj.

J. Major

★ *The Callender Gazette* estas angla revuo en kiu nia malnova amiko W. Thomson tre kapable propagandas per ĉiumonata, pri-esperanta rubriko. La revuo estas modele redaktata kaj aperas sur luksa papero. Ĉiuj konantoj de l' angla lingvo legos ĝin kun intereso. La adreso estas: Messrs. I. Beckinsale & I. E. Fisher, Callender's Cable Works, Belvedere, Kent, Anglujo.

M. Polo.

Renoviĝu vian abonon de Oomoto Internacia por la venonta jaro! Varbu kvin abonantojn, kaj vi ricevos senpage la revuon dum unu jaro! Abontarifon vidu ĉe l' fina paĝo!



Parolas la Legantaro

«Mi tralegis vian organon, ĉar ĉiu kulturo, precipe la orienta tre interesas min, kaj via organo tre plaĉis al mi, ĉar la sama principo influas ĝin, kiu instigas min en mia laboro: detruu la disigajn murojn inter la popoloj, pliproksimigi la homojn diversnaciajn unu al la aliaj kaj interfratigi ilin per la rimedo de la reciproka interkomprenigado: per la komuna lingvo. Kaj la vojo al tiu ĉi celo estas: la reciproka interkonatigo de diversnaciaj kulturoj, same kiel vi proklamas kaj ekzercas . . . Mi salutas vin korege kaj esprimas la esperon, ke ni renkontos pli ofte sur la komuna vojo kaj mi havos la okazon pli bone koni la orientan kulturon.»

*D-ro Fr. Salamon (advokato), Novi Sad.,
Jugoslavio,*

*

LIGILO, monata Esp. revuo por ĉeĥoslovakoj, skribas en sia maja numero: « . . . Oomoto Internacia fariĝis unu el la plej belaj kaj ampleksaj Esp.-revuoj. Ĝi alportas ĉiumonate al siaj gelegantoj ne nur artikolojn pri Oomoto-Movado, sed trafo- liumante la ampleksajn numerojn ni trovas artikolojn pri filozofio, literaturo, scienco, arto, recenzojn, ktp. Do por ĉiu ion. Precipe menciinda estas ankaŭ la kurso de japana lingvo por esperantistoj, kiu aperadas jam la duan jaron ĉiumonate. Ĉar ĝi estas el japanaj E.-revuoj la sola, kiu havas nur esperantajn tekstojn, ĝi estas valora fonto por informoj el Japanujo kaj Oriento entute.»

*

« . . . Mi ĉiam trovas la gazeton tre interesa. Speciale interesas min la artikoloj pri diversaj religioj kaj tiuj pri la ekonomi-

aj aferoj de la mondo. Ŝajnas al mi ke en la nuna tempo tiuj ĉi fakoj de la homa pensado kaj agado estas la plej gravaj kaj bezonas intenan klopodon por harmoniigi la diferencajn kredojn kaj ideojn.

La artikolo «Sizifa Laboro» en la Aprila numero de O. I. bone montras la neceson eltrovi rimedon por kontroladi la produktadon kaj distribuadon de la produktoj kiujn la tero kaj la homa lerteco tiel abunde provizadas.

Toleremo kaj homamo certe estas necesa por ke la homaro povas vivi en paco, sed ankaŭ bezonas sistemo kaj kompleta internacia organizo por ĉio fariĝu orde kaj harmonie.

Mi ankaŭ ĝuadas legi la artikolojn kaj anekdotojn pri Japanujo, ĝiajn vivmanierojn, kutimojn kaj pensojn diritajn de la vidpunkto de Japanoj mem . . . »

S-ro J. O. Granlund, Los Angeles, Usono.

*

Mi kun granda plezuro diras al vi, ke mi tre ŝatas la O. I. revuon. Ĝiaj artikoloj estas tre interesaj ne nur pro ilia bela kaj facila stilo sed ankaŭ pro ilia ĉiuflanke bonega enhavo. Viaj idealaj principoj povas kaj devas esti akceptitaj de ĉiuj homoj . . . Ankaŭ mi fortege aprobas vian batalon kontraŭ la neologismoj.

*S-ro L. E. Blacklock, Bournemouth,
Anglujo.*

*

Mi admiras vian gazeton kaj la zorgan kompiladon, per kiu vi ĉiuj tiel interesdone plenigas ĝin monaton post monato. Krome, ĝia abonkosto estas tre modera. Jes, sendube O. I. estas la plej bona gazeto kaj ampleksa, ekster Literatura Mondo.

*S-ro R. Banham, redaktisto de la Suda
Kruco, Aŭstralio.*

Japanana lingvo por Esperantistoj

«La japana lingvo — kun sia kurioza gramatiko, malcerta origino, antikva literaturo — estas lingvo inda al pli da atento ol ĝi ricevis ĝis nun.»

Prof B. H. Chamberlain.

(28)

La Numeraloj

La Numerativoj

Numerativo estas faka termino, kiu signifas, en japana gramatiko vortetojn kiuj esprimas tempo mezur-, aŭ pez-ideon. *Numerativoj* staras post la *numeraloj* kaj ili dependas de la naturo de l' substantivo al kiu rilatas la numeralo. Oni tuj komprenos la supran klarigon encerbigante la sekvajn, praktikajn ekzemplojn:

1.) *Homoj*. Kalkulante homojn oni devas uzi la *numerativon*.

«NIN»:

iti nin = unu (homo)

nan nin? = kiom? (da homoj)

Ano hito wa kodomo ga san nin arimasu.
tiu homo infanoj tri (homoj) havas

Li havas 3 infanojn.

2.) *Bestoj*. Numerativo: hiki
Inu ippiki = unu (hundo)
Neko wa nan biki imasu ka?
Kiom da katoj estas? (vi havas?)
nihiki = 2; sambiki = 3, ktp.

3.) *Domoj*. Numerativo: «KEN»
ikken = 1; niken = 2; sangen = 3;
ktp.
Iku ken? kiom? (da domoj)

4.) *Libroj*. Numerativo: satu
issatu = 1; ni satu = 2; (volumoj)

5.) *Objektoj cilindroformaj aŭ ŝnur-formaj*.
Numerativo: «HON»

Unu krajono = enpitu ippon
du arboj = ki nihon
tri cigaroj = hamaki sambon
iku hon? aŭ nanbon? = kiom?

6.) *Plataj objektoj*. Numerativo: mai
Kami itimai, nimai, sammaji = 1, 2, 3,

(paperoj)

7.) *Taso- aŭ glaso-pleno da likvaĵo*.

Numerativo: hai

kōhi ippai, nihai, sanbai, zippai = 1, 2, 3,
10 tasoj da kafo

8.) *Veturiloj*. Numerativo: dai
Zinrikisya itidai = unu rikiŝo

9.) *Ŝipoj*. Numerativo: SŌ
Hune issō, sanzō = 1, 3 ŝipoj

10.) *Vilaĝoj*. Numerativo: kason
ikkason = 1 vilaĝo

La ĉi-supraj 10 numerativoj povas eŝti konsiderataj kiel la plej gravaj ekzemploj. Krom ili ekzistas ĉ. 20 aliaj, kun sufiĉe da «esceptoj» kaj komplikaj, kiujn ni ne povas detale trakti tie ĉi pro manko de loko.

Sed ĉiuj 10 ĝisnun menciitaj numerativoj havas unu komunan trajton: ili estas ĉin—originaj, t. e. ON-vortoj.

Jen sekvas kelkaj numerativoj japan-originaj, t. e. KUN-vortoj:

1.) *Ĉambroj*. Numerativo : ma
2.) *Sortimentoj*. " : soroe (ekz. vestaĵaro)
3.) *Ruband-similaj objektoj* : suzi (ekz. zono)

*

El la ĝisnun traktitaj *fundamentaj numeraloj* oni povas kompreneble *derivi* la plej diversajn specialajn numeralojn (unua, unuc, duono, duoble, ktp. ktp.). Por ĉiu el la multaj derivaĵoj la japana lingvo havas propran esprimon. Tie ĉi ni kontentiĝas tamen «prezentante» la plej gvavajn el ili:

unua = dai iti
dua = dai ni

unu foje (fojon) = iti do
 du fojojn = ni do
 ktp.

dua volumo = ni satu me
 Analizante la lastan esprimon,

Oni vidas, ke ni = 2; satu = numerativo
 por libroj; me = modifa sufikso por nu-
 merativoj.

La nomo de l' monatoj

La monatoj havas specialajn nomojn
 en la japana lingvo, sed ĝenerale oni diras
 1a, 2a, 12a monato (GATU):

一月	Itigatu = Januaro
二月	Nigatu = Februaro
三月	Sangatu = Marto
四月	Sigatu = Aprilo
五月	Gogatu = Majo
六月	Rokugatu = Junio
七月	Sitigatu = Julio
八月	Hatigatu = Aŭgusto
九月	Kugatu = Septembro
十月	Zyûgatu = Oktobro
十一月	Zyûitigatu = Novembro
十二月	Zyûnigatu = Decembro
正月	Syôgatu = Novjaro

La nomo de l' tagoj

La tagoj de l' semajno, kontraŭe al la monatoj, *havas* nomojn:

dimanĉo	日曜日	nitioŭbi	(suno)
lundo	月曜日	getuyôbi	(luno)
mardo	火曜日	kayôbi	(fajro)
merkredo	水曜日	suiyôbi	(akvo)
ĵaŭdo	木曜日	mokuyôbi	(arbo)
vendredo	金曜日	kinyôbi	(oro)
sabato	土曜日	doyôbi	(tero)

La Dato

la 26an de Aprilo = Sigatu (no) 26 niti
 la 8an de Majo = Gogatu (") 8 niti
 (aŭ yôka)

la 10an de Oktobro = Zyûgatu 10 ka (tôka)
 la 15an de Novembro = Zyûitigatu 15
 niti (zyûgoniti)

La Horo

Nan zi (horo) desu ka? = Kioma horo
 estas nun?

25 minutoj post la 3a = san zi 25 hun

*

Kvankam nia studo pri la numeraloj ŝaj-
 nas eble malfacila, ni nur tuŝis la plej
 gravajn punktojn. Tio tamen sufiĉos por
 la komencanto kaj en la nova jaro ni ko-
 mencos do novan ĉapitron de la japana
 gramatiko. Je la fino de 1934 ni diru do
 al ĉiuj niaj fidelaj lernantoj.

Feliĉan novjaron!

Ŝinnen O' medetô gozaimasu! (Mi dezi-
 ras al vi Feliĉan Novjaron!)

新年お目出度ふ御座います
 Novjaron Feliĉan Mi deziras al vi

Feliĉan Kristnaskon

al vi deziras la redakcianoj de
 Oomoto Internacia. Laŭ sia libe-
 rala spirito O. I. bonvenigas viajn
 kunlaboraĵojn por la nova jaro.
 Do sendu manuskriptojn!

Ni tre dankas

al ĉiuj gesamideanoj, kiuj sendis al ni afablajn lete-
 rojn demandante pri nia farto post la lasta uragano.
 Dank' al Dio, niaj teritorioj, Kameoka kaj Ajabe,
 ne suferis damaĝon kaj ni ĉiuj ĉiam pli kaj pli
 vigle klopodas por nia movado. La leterojn ni
 publikigis sur nia japanlingva ĵurnalo, kaj pardon-
 petas ke ni ne povis respondi al ili individue.

Oomoto-Centro

Enhavo

Ekonomia Savo venos el la Oriento	3	Defendu al Nia Malatentata Fundamento	22
Esperanto kaj la Ligo de Nacioj	4	Pri la pronomoj en Esperanto	23
«Rakontoj el la Spirita Mondo»	5	Izu-spirito en vilaĝo	25
Gaja vendisto de okuloj	9	Literatura Kritiko	27
Japanujo (3)	11	Parolas la legautaro	31
Pri la du Akademioj en Parizo	17	Japana lingvo por Esperantistoj	32
La germana vidpunkto pri la rasproblemo	18	Anoncoj — Komunikoj	34
Japana Filozofio	20		

Korespondo :

★ Volas interŝanĝi p. markojn, precipe de Manĉukuo **S-ro Karl Jast** Stolzstr. 71 Zurich 6 Svisujo.

★ Deziras korespondi per poŝto-kartoj kaj tiel plu, kun japanaj gesamideanoj 10- 15 jaraj, 500 novzelandaj gesamideanoj samaĝaj. Skribu al «**Lady Gay**», «**Sun**» office, Christchurch, Novzelando.

★ Esperantistaj Filatelistoj Atentu!!! Se vi volas interŝanĝi viajn poŝto-markojn per bona metodo vi sendu viajn adresojn al: **T. P. T.** Poŝtmarkinterŝanĝejo poŝtfako 2 Cuyk a/d Maas Holandujo.

★ Volas korespondi kun esperantistoj tutmondaj precipe japanaj. **S-ro Frank Taylor** 19 St. Ives Road Halifax Anglujo.

★ **S-ro Taturu Doke.** Sendai Tachimachi 80 Japanlando, deziras korespondi pri horloĝo kun horloĝistoj aŭ iu havas rilaton al la horloĝaperoj el ĉiuj landoj.

★ **S-ro Watzinger Franz,** Fakinstruisto, Hötzen Dorfstr, 6, Villach, Aŭstrio, deziras korespondi, interŝanĝi Esp - gazetojn, librojn.

★ Aŭstria 25-jara junulo, komercisto deziras korespondi kun junaj japanaj gesamideanoj, per ilustritaj poŝtkartoj. Respondo certa. **S-ro Kurt Thoma,** Amstetten, Wörthstrasse 10 Nieder Aŭstria.

★ Deziras korespondi kun gesamideanoj tutmondaj speciale pri urbaj aferoj, ekzemple tramovoj k. t. p. **S-ro Chas. T. Cooch,** Box 390 Wellington Now Zealando.

★ **S-ro. J. Receks** 162 Task st. Sutton Beds Anglando, deziras korespondi aŭ interŝanĝi la ĵurnalojn. La respondo estas garantiata.

★ Ni interŝanĝas reklamon kun tutmondaj Esp.-gazetoj. Bonvolu sendi al ni reklamtekstojn kaj specimenan gazeton. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo.

La Red. de O. I.

TARIFO DE OOMOTO INTERNACIA

Abonkotizo : (afrankite)

Abonanto: 5 svisaj frankoj, 25 francaj frankoj aŭ ĉiu egalvaloro.

Subtenanto: 20 sv. fr. por 5 jaroj.

Dumviva abonanto: 50 svisaj fankoj.

Reklamo : Tuta paĝo: 30 sv. fr., duona paĝo: 15 sv. fr.

Anonceto : 5 linioj = 2 resp.-kup. Por 6 foja enpresado = kvarobla prezo.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi du senpagajn anoncetojn jare.

Multaj premioj estas dissendataj.

La abonkotizon sendu rekte al Oomoto Centra Oficejo, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年貳圓四拾錢

昭和九年十二月一日印刷 昭和九年十二月一日發行

編輯發行印刷人 高木鐵男 京都府南桑田郡龜岡町
荒塚字内丸一

印刷發行所 天澤社 (振替大阪75917番) 全

Oomoto-Presejo, Ten'on-kjo, Kameoka

NIAJ REPRESENTANTOJ

Aŭstrujo	S-ro L. Thomson, c/R; Rawson, 163 Exhibition str. et. Melbourne.	S-ro Anton A. Ehm, Zittau. Sa., Bahnhofstr. 32.	Jugoslavujo	S-ro Marko Dominis, Split Zrinjska Str. No 1 c	
Aŭstrujo	D-ro Carl Mimler, Wien VIII, Albertgasse 1-a, S-ro Bernhard Selzer, Etteneichgasse, 4, 31 Wien X	S-ro Gottlieb Strofsner, Munchen S. 50. Bavarujo, Dietramszellestr. 10. 21.	Latvujo	S-ro Karlo Subergs, Riga, Milgravis azera str. 6--1.	
Brazilo	S-ro Majumi Kondo, Caixa postal 3594, S. Paulo.	S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8 a, Flensburg. S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 3/1. Heilbronn.	Litovujo	S-ro Andrius Borkauskas, Pakruojaus g. 3. Radviliškia.	
Bulgarujo	S-ro Ivan Kirov, Popska, 484 Sliven. S-ro Georgi Dončev, str. officerska 25, Tirnovo. S-ro Atanas Nikolov, Sevlievo, Burgas.	Hindujo	S-ro Liem Tjong Hie, Semarang, Karangtoeri 66, Java.	Nederlando	F-ino G. de Waart, Box 23, Hilversum.
Ĉeĥoslovakujo	S-ro Rudolf Burkert, Kalvariengasse 34-IV, Nie- mes. S-ino Sofie Cibera, Plzen III, Zizkova 52.	Hispanujo	S-ro Francisko Miralles, Hellin (Albacete). S-ro Salvador Viladelmas, Colon 52-54, Sabadell (Bar- celono).	Novzelando	F-ino Coralie Smythson, 47A Aurora Terrace, Wellington, C. 1.
Francujo	S-ro Simon Frantz, 21, rue Alain Chartier, Paris XV.	Hungarujo	S-ro Paŭlo Balkanyi, Poŝto 507, Budapest.	Persujo	S-ro Dariuŝ Nemseĉi, Tabriz.
Germanujo	S-ro Kurt Wuensche, Augustenstr. 17, Leipzig-R.	Ĥinujo	S-ro Sh. M. Chun, N.Y.M.S. Lungkuwa, Shanghai.	Polujo	S-ro Adolf Oberrotman, Varsovio, Krak—Przedm 10 S-ro Denysiuk Les, Dolina, Rachin 20.
		Italujo	S-ro Luigi Minnaia, Via del Giglio 16, Roma 115. S-ro Giulio Matuella, Corso Garibaldi 325, Mazzolombardo (Torento).	Svisujo	S-ro Karl Jost, Stolzesstr. 7, Zurich 6.
				Usono	S-ro John Lester Lewine, 150 E. 72 nd. St. New York S-ro K. A. Suzuki, Orange Petroleum Co. Ora- nge (Texas)

Oomoto-Fotalbumo

Bildperspektivoj de Oomoto

200 fotogravuraĵoj sur luksa papero kun esperanta kaj japana klarigoj
Formato: 29 x 37 cm. Prezo: 20 sv. fr. (sendkostoj inkluzive)
Limigita eldonnombro, bibliografia maloftaĵo.

Ĉu vi ne ŝatus viziti la Oomoto-Teritorion de Ajabe aŭ Kameoka?

Ĉu vi ne ŝatus promeni meze de sanktejoj, «labor-oferantoj» parolantaj esperante, vidi la Majstron, viziti la Esperanto-Fakon de Oomoto, la presejon kie oni presas Oomoto Internacia, la oficejon, kie oni ĝin redaktas?

Certe vi ŝategus vidi pitoreskan Japanujon, kies koro pulsas ĝuste tie kie troviĝas la Centro de Oomoto.

La distanco kaj la lingvaj malfacilaĵoj vin malhelpas...

Jen venas la FOTO-ALBUMO de OOMOTO kiu alportas la TERITORIOJN rekte al vi, en formo de 200 artaj fotogravuraĵoj, kun japana kaj esperanta klarigoj. La Albumo estas valora dokumento, trezoro de bibliotekoj, pruvo por la praktika uzo de Esperanto en grava movado de l' Oriento, kiu dank' al la Internacia Lingvo fariĝis kaj estas vere tutmonda, tuthomara...

Mendu la Albumon antaŭ ol estos tre malfrue. Rigardu ĝin kaj montru ĝin al viaj amikoj, propagandu per ĝi Oomoton, Esperanton, Homaranismon.

Mendon sendu al
Oomoto Centra Oficejo
Kameoka Kioto-hu Japanujo.

Kio estas Oomoto?

Eld. de Oomoto-Centro

5-a eldono. Kompleta klarigo pri la historio kaj la nuna stato de Oomoto, la biografioj de la Fondintino kaj de la nuna Majstro, la doktrino de Oomoto... 100 paĝoj kaj multaj fotoj. Sv. Fr. 1.00

Sinjoro Laŭdata

De tutmondaj Esperantistoj

Vera literatura trezoro, kun originalaj poemoj, kaj frazoj dediĉitaj al Majstro O. Deguĉi. 2-a luksa eldono, modele aranĝita, ore surpresita, tole bindita, 200 paĝa. Teksto: Esperante kaj japane. Sv. Fr. 2.50

Fundamento de Animo

De Onisabro Deguĉi

Plena pritrakto de Oomoto-Instruo pri homa spirito, postmorta vivo, spirita mondo, ktp., en dek ĉapitroj. 50 paĝoj. Sv. Fr. 0.50

Perpoema Vortaro Esperanto - Japana

De Onisabro Deguĉi

Enhavataj 4,800 japanaj poemetoj verkitaj en lerta kaj spirita maniero, tute facile memorigas saman kvanton da Esp. vortoj. Bonega ornamo de ĉiu biblioteko, kun bela kovrilo el silko 360 paĝoj. Sv. Fr. 3.00

What is Oomoto?

Eld. de Oomoto Oficejo

La plej kompleta konigilo pri la potenca spirita movado por anglalingvanoj. Multaj interesaj informoj pri Japana kulturo. 130 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj. Sv. Fr. 2.00

Ĉiu prezo enhavas sendkoston. Ĉiu eldonaĵo estas havebla ĉe Libro-Fako de Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

